

2/3 ☆ 1995 ☆ 164

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Variabilní symboly pro platby Českému esperantskému svazu

694	členské příspěvky ČES
694.1	členské příspěvky UEA
694.3	dary členů
604.2	písemné kurzy
604.3	předplatné Starto (48 Kč v tuzemsku, 120 Kč pro zahraničí, UEA 15 NLG)
604.31	předplatné Sano
604.32	předplatné Juna Amiko (Hasala)
604.4	předplatné Heroldo de Esperanto
325.6	inzerce v Heroldo de Esperanto
604.5	předplatné Internacia Fervojisto (Piŝtoro)
789.1	sekce mládeže
789.3	sekce železničářů
789.4	předplatné Dia Regno (Polnický)
789.5	vědeckotechnická sekce (Pospíšil)
789.7	sekce pedagogů
789.71	členské příspěvky ILEI včetně Internacia Pedagogia Revuo (celkem 100 Kč - Malovec)
789.10	sekce šachistů (Štěpánek)
789.11	sekce sběratelů
789.13	Scienco Revuo
789.15	ediční fond, Ringo
789.17	sekce nevidomých
668.1	dividendy
682	tržby z prodeje cenných papírů a vkladů
311	expedice, úhrada koupených knih a materiálu

Účel platby doporučujeme napsat i dozadu na poštovní poukázku na místo vyhrazené pro "Zprávy pro příjemce".

EVENTOJ denove aboneblaj

Interesatoj pri la plej ofta Esperanto-periodaĵo EVENTOJ skribu al la nova peranto Vladislav Hasala, poŝtkesto 34, 696 62 Strážnice, tel. 0631/942 507 aŭ 0631/2079.

La abonkotozito por 1995 estas 570,- Kč.

Informoj el la komitato de ĈEA

Al la aprila kunsido estis la komitato invitita en Trutnov, kie ĝi traktis la 29-an de aprilo. El la traktitaj programaj punktoj mi anoncu: Finfine solvigis la posteno de la UEA-ĉefdelegito por Ĉeĥa respubliko. La estraro de UEA akceptis nian proponon kaj tial la funkcion transprenas samideanino Stanislava Chrdlová (adreso: Anglická 878, 252 29 Dobřichovice). Ĉe tiu okazo mi sentas mian devon danki al Linhart Rýznar el Svitavy, kiu multajn jarojn - ĉefe en la tempo, kiam ĉiu oficiala respondeculo de „okcidenteŭropa“ komunumo havis daŭrajn problemojn fare de komunismaj ŝtatorganoj - plenumis tre ofereme kaj bonege tiun ĉi pretendan funkcion.

La komitato ankaŭ akceptis retiriĝon de samideano Adolf Staňura el Haviřov el la gvidado de la lingva komisiono de ĈEA. La kaŭzo estas lia aĝo kaj sanstato. Ankaŭ al tiu honora membro de ĈEA la komitato esprimis dankon por farita laboro, kiu ofte ne estis tro videbla sed grave helpis al bona lingvaĵo de multaj asociaj eldonaĵoj. Lige kun tio la komitato decidis ne plu havi oficialan lingvan komisionon, ĉar la malpli viglan eldonagadon en nunaj cirkonstancoj kapablas lingve memstaraj fakuloj inter niaj membroj (M. Malovec, J. Vondroušek, K. Kraft kaj aliaj).

Grava parto de la komitata programo estis dediĉita al UK en Prago 1996. Estis kompletigita LLK, oni diskutis proponojn de la kongresa emblemo kaj pri kelkaj aliaj organizaj paŝoj. Oni preparolis ankaŭ aligitajn programerojn al UK - nome la antaŭ kaj postkongreson. La atenton en

diskutoj kaptis ankaŭ karavano al UK en Tampere kaj la stato de preparoj de IKUE-kongreso en Olomouc.

Al la plej gravaj punktoj de la programo apartenis debato dediĉita al la asocia membraro. Oni taksis rezultojn de aktualigo de membro-sliparo, kiu ĝuste finiĝis, diskutis pri pensmaniero de adresaro por dissendado de Starto kaj pluaj demandoj, kiuj ligiĝas al niaj membroj. Kompreneble, ke en la programo ne povis manki detalaj informoj pri aktuala stato de asocia mastromado kaj pri nia rilato al UEA (membrostatistiko k.s.). La komitata menuo krome havis plurajn erojn, pri kiuj estas necese daŭre informiĝi.

La komitato traktis en bona agordo kaj la komitatanoj senproteste akceptis novajn taskojn kun plena respondeco.

V. Kočvara, prezidanto



Japania vizito

Kunvenon de la Esperanto-klubo en Olomouc la 21. 3. 1995 vizitis japana ĵurnalistino s-anino Kazuko Kikushima, kiu venis en nian landon je invito de la Unio de nevidantoj, ĉar ŝi studas vivkondiĉojn de ĉi tiuj civitanoj en diversaj eŭropaj landoj. Venontan tagon ŝi trarigardis memorindaĵojn de la urbo Olomouc. Ŝian interenson vekis ankaŭ la ekspozicio „Mondo de teo“ en la Regiona Muzeo. Vespere ŝi forveturis en la urbon Přerov. Si partoprenis tie kunvenon de la loka Esperanto-klubo, kie ŝi prelegis pri sia vojaĝado en Mongolio.

V. Mohapl

Esperanto en teatra festivalo

En du ĉelimaj urboj - la ĉeĥa Český Těšín kaj la pola Cieszyn - okazis jam sesfoje la internacia teatra festivalo. En ĝi partoprenis diversaj teatroj prezentantaj dramverkojn en la ĉeĥa, pola kaj slovaka lingvoj. Ĉijare en maja semajna programo oni enprogramigis unuafoje teatraĵojn en Esperanto. La 10-an de majo prezentigis en la kamera salono de la kultura domo „Dom narodowy” en Cieszyn J. Gibczynska el Krakovo, kiu ludis monodramon pri la vivo de Zamenhof kiel lin vidis lia patrino, edzino kaj filino. Inter kvindekda spektantoj estis krom Poloj ankaŭ Ĉeĥoj kaj ankaŭ hazarda gasto el Aŭstralio.

Oficiala akcepto de Esperanto fare de organiza festivala komitato estas grava sukceso atingita danke al iniciato de loka esperantistaro, ĉefe nia amiko inĝ. Glajcar. Pri la prezento informis ankaŭ ĉeĥa gazetaro.

V. Kočvara

Kiel vi uzas Esperanton en la praktiko?

Nia E-societo nomiĝas „Praktika Linio” kaj estas - laŭ niaj espero - linio senfina, al kiu rajtas aliĝi ĉiu ajn, kiu parolas la Internacian Lingvon almenaŭ en konversacia nivelo kaj uzas ĝin en la praktiko.

Via aliĝo al la Praktika Linio havas unu kondiĉon: sendu al nia adreso ĉiam ĝis la 31-a de majo en ĉiu jaro en longeco de 1 linio ĝis 1 paĝo informon, kiel vi uzis Esperanton en la pasinta jaro, kiel vi aplikis ĝin en la praktiko, ĉu vi faris ekzamenojn k.t.p. Kompense vi ricevos de

ni la alvenintajn adresojn.

En 1996 ni intencas eldoni libron „Kiel mi profitas Esperanton?” Nun ni kolektas ideojn, pensojn kaj manuskriptojn. Bonvolu al ni skribi, kiel vi profitis Esperanton ĝis nun kaj kiajn rezultojn vi atingis.

Jozefo Baksa,
pk 263, 8901 Zalaegerszeg, Hungario

Operlingvo?

En la teatro Archa (Na Pořičí 26, Praha 1) mi ĝuis prezenton de Opera La Serra (15. 2. 1995, 20.00).

La ĉeĥaj aŭtoroj, *Michal Vích* (muziko) kaj *Jaroslav Dušek* (libreto) estis gvidataj de l' ideo, ke operŝatanton interesas ĉefe la muziko, ĥoreografio kaj scenejo, dum la kantataj tekstoj restas plejparte nekompreneblaj, do neglektataj. Tiu ĉi cirkonstanco sugestis al ili elpenson de operlingvo, trafe nomita „operanto”. Ĝin komprenas nek la spektantoj, nek la kantantoj, nek la tekst-aŭtoro mem. Tamen ĝi bone taŭgas por esprimi ĉion, kio estas okazanta sur la scenejo. Jen kelkaj ekzemploj:

1. komencaj vortoj de l' amdueto:
Sita sitavá, duňa prekolá...
2. komenciĝas la minac-averto:
Ahra bahrá...
3. la baldanco: *Oň gola maradžina...*
4. ploras la fraŭlo: *Ju hu, jů hů ...*
5. la decida batalo:
Sykota rejta zumra mruskata...

Jen originala lingva komunikilo, kies nomo iom suspekta similas al Esperanto, ĉu ne?

J. Kavka

El Praga PEN-Kongreso

Perla Ari Martinelli, ĉefredaktorino de Literatura Foiro (Svisl.) kaj Giorgio Silfer, direktoro de LF-Kooperativo raportas en LF (153, febr. 1995) pri la mondkongreso de PEN-Klubo Internacia en Prago, 1994.

Ŝi substrekas en artikolo „Kaj la Dnjestro ruladas sin plu“, ke „la kongreso rezervis al la Esperanta PEN gravajn sukcesojn.“ Temas pri stato de etnaj minoritatoj (hungara en Rumanio kaj rumana en Dnjestrio). La esperantisto devis fari geopolitikan klarigon pri Dnjestrio, ŝajne konata al neniu okcidentano. - En aprobo de du rezolucioj aktivis Silfer kaj poste en asemblea baloto „la voĉo de nia delegito estis decida“.

Tio ĉi montras la prestiĝon de la Esperanta PEN kaj rapidan integriĝon en la tuta PEN-Klubo, kio kaŭzis poste oficialan inviton (kvankam ĝi estas registrita en okcidenta Eŭropo) al la konferenco de la orienteŭropaj PEN-centroj en Rumanio, septembron 1995. La efektiva vivo de la Esperanta Centro rolas en plivalorigo de Esperanto „ĉe la verkistara UNO“. Nia Centro estis oficiale listigita inter la membroj de la Pac-Komitato. Laŭ reprezentantino de Unesko, la PEN-Klubo Internacia estas nun la plej prestiĝa el la neregistaraj organizoj de Unesko. (Ni scias krome, ke ankaŭ UEA havas konsultan postenon ĉe Unesko).

J. Mařík

Giorgio Silfer pri bela Prago kaj surpriza Havel

En artikolo „Lingvoj adaptiĝas ...“ de G. Silfer, direktoro de LF-Kooperativo (Svislando), mi elpikas pri la praga kongreso de PEN-Klubo Internacia, 1994.

„Kiel fartas Esperanto-verkisto en Prago?“ Li respondas: „Sufiĉe bone kaj tre okupite“. En la kongreso Silfer kontaktis nur unu „samlingvanon“ (esperantiston), kiu ĉestis kaj estas la plej grava privata eldonisto en Ĉeĥio. (Kiu alia - laŭ mi - ol Ivo Železný? Cetere aperos intervjuo kun li.)

La urbo Prago laŭ Silfer: urbo arte kaj historie riĉa, kiel Florenco (sed jam ne kiel Romo aŭ Venecio), ĝi estas unu el la plej belaj urboj en Eŭropo. Samtempe ĝi aspektas iel ekster Eŭropo, preskaŭ nedifinebla, kiel la aĝo de la fantomoj kiuj vivas en la legendoj de multaj strat-anguloj. Mi perceptis Pragon urbo kun duobla personeco: foje mi sentis min en okcidento, sed ofte multe pli oriente ol, ekzemple, Budapeŝto. Kiam mi ne konis Pragon, mi rakontigis ĝin al mi, de vizitintoj. Rezultis el tio la unuaj versoj de ne eldonita poemo: *Trista kaj verve juna (kiel la printemp' en Prago...)*! Nu, mi vizitis la urbon aŭtune, sed mi eksentis tion, kio povus esti la doloro de la printempo. Sed ĉu sprosoj „doloras“? kiel mampintoj de pubera brusto?

La kongreso mem estis pli trafa en la surprizoj ol en la atendoj. Elreviĝo estis la parolado de Václav Havel: kiu ajn „negro“ de duaranga kulturministro kapablus je tio. Nu, Prago 1994 ne estas Parizo 1848 ... -- Ankoraŭ pli ol en Santiago (en la antaŭa kongreso) mi sentis ke nia lingvo estas akceptata kiel arta perilo, kaj eĉ kreskas la interesiĝo pri nia literaturo: en venonta PEN-kongreso necesos kontentigi ĉi tiun deziron. ---

(El kromnoto ni sciiĝas, ke la altajn aliĝkotonajn kaj veturkostonajn pagas la delegitoj el sia poŝo kaj 65-7501-8 Svislando - Antaŭdankon! ...)

J. Mařík

9000 periodaĵoj en Esperanto (21)

Jablonné nad Orlicí estas negranda vilaĝo (2 000 loĝ.) en la orienta Bohemio. Tie, ĉe esperantista eldonisto Antonín Pražák, aperis en 1934 verko ĝis tiam unika: tutmonda Katalogo de la Esperanto-Gazetaro, komplita de József Takács, konata madjara aktivulo. La kolekto enhavas ankaŭ titolojn de nacilingvaj gazetoj kun E-rubriko kaj de gazetoj de diversaj „mondlingvoj“.

Tiu verko post la 60 jaroj estas jam longe neaktuala. Alia madjaro, d-ro Árpád Máthé, post longa kaj pretendo-plena laboro, en kunlaboro de ge-hispanoj L. Fl. Yzal kaj A. M. Urgellés, preparis novan aktualan eldonon. La provekzemplero, publikigita en n-roj decembro 1993 ĝis decembro 1994 de „PERIODAĴOJ“, organo de Rondo Takács, enhavas ĉirkaŭ 5.000 titolojn (kun, se konate, eldonjaroj kaj lokoj.)

Komisiita revizii kaj kompletigi la kolekton per indikoj pri E-periodaĵoj precipe en la ĉeĥa kaj slovakaj teritorioj, mi faris vere temporaban kaj okul-pretendan laboron kaj elskribis la koncernajn periodaĵojn aperintajn en niaj teritorioj. Ilia nombro estas surpriza: 336 titoloj, inkluzive de bultenoj de germanlingvaj esperantistoj nialande. Komprenoble, inter ili estas ĉio, ankaŭ kun vivolongo efemera, bultenoj, informiloj. Krom tiuj elskriboj mi kompilis liston de kompletigoj ĝis la stato en 1994/95/ pri periodaĵoj - mankantaj ĉe Máthé: 15 titoloj. El mia postrestinta arĥivo (ĉ. 90 kg da revuoj mi estas donacinta al la Muzeo en Ĉ. Třebová) mi aldonis ankaŭ 13 titolojn de alilandaj gazetoj mankantaj ĉe Máthé (ekz. eĉ el Bomeo).

Iuj periodaĵoj certe estas nekonataj

al niatempuloj: Kata Gazeto (Hradec Králové, 1967-69), Internacia Gazetara Sporta Servo en Aussig/Ústí n. L., Ĉeĥa PEK-bulteno („ie en Ĉeĥio“), Esperantský svět - („ie en Ĉeĥio“).

En mia kompletigo de donitaĵoj estas ankaŭ monda unikaĵo: ĉiutaga kurso de E., kun 60 lecionoj, de geedzoj Chrdle, en nia EXPRES (Praha, 1991). La plej eta presita bulteno en mia kolekto estas „Esperanto Lega Rondo“ (Germ., 1917, 18x11 cm), la plej granda estas la „giganta“ „La Gazeto“ (Fr., 49x32 cm).

Krom la trovo de novaj 28 titoloj mi precizigis en la listego de Rondo Takács indikojn ĉe 73 titoloj. - Por la fino de 1995 la Rondo planas eldoni ĝisdatan liston de ĉ. 9 000 titoloj (!).

Nin povas interesi, ke d-ro Máthé persone ĉerpis ankaŭ el la biblioteko de EK Praha, dum kelkhora restado. La ne elĉerpitajn informojn oni nun devus serĉi en la Muzeo en Česká Třebová, kien la biblioteko estis forlokita.

J. Mařík



Unuaj provoj pri UK en Ĉeĥio

En 1996 estas okazonta en Praha la 81-a Universala Kongreso de Esperanto. Interesas ekscii, ke jam en j. 1909 la magistrato de Prago sendis sian oficialan delegiton, konsiliston Biskup, kiu estis membro de la Bohema Asocio Esperantista, al la Universala Kongreso en Barcelono kun la celo inviti la UK por la j. 1912 en Pragon. Same faris Asocio por fremdultrafiko.

Tamen fine, la UK en 1912 okazis en Krakovo, unu el la tri proponitaj urboj, el kiuj la tria estis Graz. (Interese, ke la urbo

Vieno malpermesis inviti la UK en Vienon). Nur en 1921 efektiviĝis la espero de la urbo Prago: okazis tie la 13-a UK (Slava insulo).

Por 1992 estis planita UK por Prago, sed pro malhelpoj ne okazis. Fine, venontjare okazos en Prago la 81-a UK. UEA jam aprobis la Lokan kongresan komitaton. La centro de Eŭropo certe aliros multajn kongresanojn.

Ni kondolencas

Ni kondolencas al la Esperanto-klubo en Olomouc, kies membro, ing. František Svoboda forpasis la 9-an de majo en sia 57-a jaro. En kelkaj lastaj jaroj li motoris kelkajn gravajn eventojn de nia movado en Olomouc. Mi menciu almenaŭ la 5-an kongreson de ĈEA en 1987 kaj la 43-an kongreson de IFEF en 1991. En li perdas Ĉeĥa Esperanto-Asocio entuziasman kaj laboreman membron.

V.Kočvara



Mgr. Zdeněk Hršel

Je „to“ vĝdy „tio“?

Jazyková poznámka

Ĉtenář namítne: „Proč ten otazník? Vĝdy to tak stojí ve všech slovnících a učebnicích.“ To je možné. Ale slovník od Kühnla a Procházky (1914) uvádí také „kdo je to? - kiu ĝi estas?“ a slovník bratřů Filipů (1949) m. j. „co je to? - kio estas tio? kio ĝi estas?“ a „kdo je to? - kiu li/ŝi estas?“.

Co o zájmenech „tio“ a „ĝi“ říká největší esperantský slovník, Plena Ilustrita Vortaro (PIV)? U hesla „tio“ uvádí m. j. tyto příklady: tio estas tre facila; kion tio

signifas?; ĉu tio estas vi, Ivan?; tio, kion vi diras, estas tre grava; mi volis atentigi vin pri tio, ke en nia afero ĉio povas esti atingita nur per harmonio kaj konstanteco. Když uvedené příklady vyjádříme česky, ekvivalentní „to“ bude vždy přízvučné.

U hesla „ĝi“ uvádí PIV tyto příklady: la tranĉilo tranĉas bone, ĉar ĝi estas akra; la infano ploras, ĉar ĝi volas manĝi; ĉu ĝi estas vi? jes, ĝi estas mi; ĉu ĝi estas ebla, ke ... Když tyto příklady vyjádříme česky, pak u prvních dvou příslušná zájmena zamluíme (nuĝ - on, diĝ - ono), avšak u třetího - jsi to ty? ano, jsem to já - užijeme ukazovací zájmeno „to“, avšak bez přízvuku. A teĝ si už můžeme stanovit jednoduché a praktické pravidlo, které se - pokud vím - nevyskytuje v žádném naším učebnici esperanta. **Ĉeské ukazovací zájmeno „to“**, pokud je na něm ve větě přízvuk, odpovídá esperantskému „tio“; **není-li na něm přízvuk**, odpovídá esperantskému osobnímu zájmenu „ĝi“. Doloĝme si to na příkladech.

Jak je to snadné! - *Kiel facila ĝi estas?*
Zajímá tě to vůbec? - *Ĉu ĝi interesas vin?*
Řekneš mi to konečně? - *Ĉu vi fine diros ĝin al mi?*

Už je to uděláno. - *Ĝi estas jam farita.*

Všimněme si, že nepřízvučné „to“ v 1. pádě stojí za časovým slovesem.

„To“ však může být i částice, jednak citová, zdůrazňovací, např. „to (ale) přší!“, „co to neseš?“, „to se mu to jde!“ - „To nepřijdeš domů?“ Že tu v esperantu nebude „tio“, je jasné. Jak je vyjádřit esperantsky, dáváme za dobrovolný úkol vám, milí čtenáři. Odpovídající řešení otiskneme se jménem původce.

Ĝis relego!

DEMOKRATIA UNIO PRI ESPERANTO

Dum la kunveno de la Demokratia Unio en Ostrava en la klubo Alfa 30. 5. 1995 je la 19-a horo estis metita jena demando: „Kiel vi konsideras la internacian lingvon Esperanto, kia estas rilato de la Demokratia Unio al la lingvo?“ Respondis la prezidantino de la Demokratia Unio inĝ. Alena Hromádková: „Nia rilato al Esperanto estas tre pozitiva. Mi mem Esperanton elernis, akiris amikojn. Helpe de Esperanto estis eble en la pasintaj jaroj ligi kontaktojn, ekscii interesaĵojn, kiam alimaniere tio ne eblis. Esperanto estas tre bona rimedo por interkompreniĝo.

(V.Sládeček)

Bernard Golden:

ETIMOLOGIO

**La veneno de la ezoko
kaj la deveno de la bakfiŝo**

Moto:

Putrado de fiŝo komenciĝas de l' kapo

Etimologia diletanteco

Jan Werner ĉe la fino de sia artikolo pri terminografio (**Starto** 4/1992 [151], 4-6) konkludis, ke ĝis nun esperantistoj laborantaj sur la faklingva tereno diletas (1), tio estas ili agas neprofesie. Oni ja povas trovi ankaŭ aliajn lingvoterenojn, kie malfakuloj agadas amatorece kaj produktas fuŝajn rezultojn. Unu el tiuj fakoj estas la etimologio, kie ofte senlima imagpovo de aŭtoroj anstataŭas faksciojn pri lingvoj kaj lingvistika metodologio. Ekzemple, Leander Tell en **La bela subtera mondo** klarigas, ke “stalaktito” kaj “stalagmito” venas de la grekaj vortoj **stalagma** (= guto) kaj **lithos** (= ŝtono) (pĝ. 21). Nu, s-ro Tell estas speleologo, ne etimologo, do li stumblis pri la deveno de la du geologiaj fakterminoj. En la

helena lingvo, **stalaktos** signifas “gutanta” (de la plafono de kaverno). Ekzistas ankoraŭ du vortoj, **stalagma** (= guto) kaj **stalagmos** (= gutanta). Al la radikoj **stalagm-** kaj **stalakt-** estas aldonita la helena sufikso **-itēs**, uzata por nomoj de mineraloj. Estas, do, evidente, ke la helena vorto **lithos** (= ŝtono) tute ne formas parton de “stalaktito” kaj “stalagmito”.

Ankaŭ la ezoko alportas bizarajon

Lastatempe mi trovis ankoraŭ unu ekzemplon de fantazia etimologio en la romano **La nokto de la ezoko** (1992) de Serĝo Elgo (pseŭdonimo de la franca esperantisto Georges Lagrange (2). Jen du citaĵoj.

a. “Kiam mi estis dekdujara knabeto kun rigida harplekto ĉe la dorso, kiam mi estis iu ‘Backfisch’, kiel diras la Germanoj, kaj vi reveme bela kaj senaplomba junulo ...” (pĝ. 79).

b. “Unue mi estis nur ridinda ‘Backfisch’, kiel mi jam diris kaj cetere mi sciis, ke vi estas treege enamiĝinta” (pĝ. 147).

Rimarku, ke en la du citaĵoj “Backfisch” aperas kiel neasimilita germana vorto. Kio je la kadavriĝinta kapo de la ezoko estas tiu “Backfisch”? Nu, Elgo/Lagrange komplezeme glosas tiun fremdajon jene.

BACKFISH: (prononcu: bakfiŝ) germanlingva esprimo, laŭvorte “retrofiŝo”, t. e. fiŝeto, kiun oni rejetas al la maro, ĉar ĝi estas ankoraŭ tro malgranda. Serca esprimo por nomi tro junajn junulinojn, ankoraŭ ne sufiĉe virinajn” (pĝ. 171).

Okazis fiŝa fuŝo en tiu gloso, ĉar la dua silabo de la vorto ŝanĝis sian naciecon kaj aperis en la angla formo: **-FISH!** Efektive, la gloso demonstras sen nubo da dubo, ke Elgo/Lagrange kompetentas nek pri iĥtologio (fiŝscienco), nek pri ortografio, nek pri etimologio.

La bakfiŝo de Raymond Schwartz

Tri jardekojn antaŭ la publikigo de la romano de Elgo/Lagrange, alia franco, Raymond Schwartz, kontribuis la vorton "bakfiŝo" al la Esperanta slango. Jen du citaĵoj el lia romano **Kiel akvo de l' rivero** (1963).

a. "Baldaŭ poste la servisto enkondukis ankoraŭ unu patrinon, kun filino ĉi-foje, knabino en la bakfiŝaj jaroj" (pĝ. 141 - 142).

b. "Tute simple krii en lian vizaĝon: Tri berlinaj bakfiŝoj deziregas vidi vin! moketis Lotte" (pĝ. 148)

Piednote de pĝ. 142 la glosa de Schwartz klarigas, ke "bakfiŝo" ne estas fiŝkaptada sed kulinara termino.

"Germ. **Backfisch** = bakfiŝo, sed ni diras, pli ĝuste, fritita fiŝo. La plej ofta senco de **Backfisch** en la germana lingvouzo estas 'plaĉaspekta fraŭlineto, ĝenerale inter 14 kaj 17 jaroj.'"

Ho ve! Ĉu okazis krak' en la kap' de Elgo/Lagrange? Kie li fiŝis sian falsan etimologion de "Backfish" [tiele!]? Nur se ĝi estus angla kunmetaĵo - **back** + **fish** - estus eble traduki ĝin per "retrofiŝo". Pruvo, ke ĝi estas germandevena, troviĝas en germanaj vortaroj, kiuj, krom la primara signifo de bakita fiŝo, aldonas ankaŭ la figuran sencion de "junulino", "junfraŭlino", "adoleskantino" k. s. "Bakfiŝo" kiel depruntita vorto troviĝas ankaŭ en la nederlanda, norvega, sveda kaj hungara lingvoj. Estas atestaĵo, ke **Backfisch** kun la metafora senco de nematureco aperis en la germana lingvo jam en 1555.

Notoj:

1. La verbo "dileti" ne estas registrita en **Plena Ilustrita Vortaro kaj Suplemento (PIVS)** sed ĝi estas facile retroformita de

la substantivo "diletant/o" laŭ la analizo "dilet/ant/o".

2. La pseŭdonimo Serĝo Elgo estas formita anagrame surbaze de kelkaj literoj en la franca nomo de la aŭtoro, Georges Lagrange.

g e O R G E S L a G r a n g E + O

Sieĝo de Brno

Ĉijare la urbo Brno rememoras la 350-an datrevenon de sieĝado fare de la sveda armeo en la jaro 1645. Furiozis la Tridekjara milito, kaj al Brno almarŝis svedaj trupoj sub komando de generalo Leonhard Torstenson. Unuafoje en 1643: tiam la armeo restis ĉe Brno nur kelkajn tagojn, ne komencante sieĝadon, ĉar la urĝaj militaj devoj revokis ĝin reen al la nordo de Eŭropo. Nur en 1645, kiam estis konkeronta precipe Vieno (de kiu Brno ne multe distancis!), Brno travivis sieĝadon kun ĉiuj sekvoj. La sieĝado daŭris de la 3-a de majo ĝis la 27-a aŭgusto 1645, kaj por honori la urbon necesas diri, ke kvankam generalo Torstenson disponis pri preskaŭ dudekobla superforto de bone ekzercita kaj armita armeo, la defendantoj de Brno, fakte nur simplaj loĝantoj, brave rezistis ĝis plena venko. Torstenson ne sukcesis Brnon - kiel unu solan el urboj de Moravio - faligi sur genuojn kaj konkeri.

La defendon de Brno tre sukcese organizis juna franca kolonelo Raduit de Souches, kune kun la komandanto de la kastelo Ŝpilberk George J. O'Gilvy, kun rektoro de la jezuita kolegio de Brno patro Martin Štředa (Stredovius) kaj kun la landa hetmano Zikmund Ferdinand Sak de Bohuňovice. Kvankam ankaŭ Brno suferis multajn materiajn damaĝojn, ĉirkaŭ 250 loĝantoj falis kaj plujaj dekoj

estis vunditaj, la atakon ĝi eltenis kaj ne rezignis. La batalo pri Brno estis el vidpunkto de la Tridekjara milito nur malgranda epizodo, sed por la historio de la urbo mem, kiu pro sia heroo defendo estis honorita de la imperiestro per titolo de landa ĉefurbo kaj per pluaj ekonomiaj kaj politikaj honorigoj, havis kaj havas ĝis nun grandan signifon: ĝi pruvis, ke kiam la civitanoj scias unuigi en oferemo por sia urbo, ili kapablas rezisti ne nur al milita superforto, sed kapablas solvi ankaŭ aliajn gravajn problemojn de la urbo, kiuj poste alportas utilon eĉ al ili mem. Kaj tio estas, miaopinie, tre instrua heredo el la historio de tiuj militaj jaroj.

*Dr. Milena Flodrová,
historiistino de Brno*

Vladimír Menšík

Inula vino

Luboš Kostelka, multe pli ol ni ĉiuj, krom tio, ke li studis kun ni Janáček-Akademion de Muzaj Artoj en Brno, zorgis ankaŭ pri tio, kio okazas ĉirkaŭe, kia estas la vivo kaj prosperado. Tial li sciis, ke en Slovakio mankas pura alkoholo, sed kompenso ili havas Montgomery-mantelojn (estis post la milito), sekve li venis al mi (mi loĝis en fabriko, kiu estis kemia kaj havis damifonojn) kaj diris: „Elpruntu du tri damifonojn, knaboj de farmacio donacos al mi puran alkoholon, kaj mi vestos vin.“ Simple, ke mi ricevus manteleton. Tial mi alportis al Luboš la petitajn damifonojn, kaj li diras: „Ĵaŭde mi altrajnos direkte de Púchov, atendu, kaj Montgomery-mantelo estas via.“ Mi atendis kaj vere, la unua, kiun mi vidis (la pordo rapide malfermiĝis), elrigardis Kostelka. Mi diras: „Diable, preciza li estas,“ sed li elsaltis el la trajno, kaj

kvazaŭ min ne konante, preterkuris min. Mi diras: „Lubošĉjo, ĉi tie, - nu! - la Montgomery-mantelon!“ Li respondas: „Sprintu for, mi petas, persekutas min polico!“ Sekve mi ne havis damifonojn, li ne havis alkoholon, kaj la Montgomery-manteloj ... pri tiuj ni povis nur sonĝi!

Kaj ĉi tiu Luboš Kostelka estis enorme inventema agemulo, ĉiam, kiam al li ŝajnis, ke ekzemple inter la domoj restis ne ekspluatita spaco, li konstruigis tie tenisejon. Origine li planis naĝejon, sed ni malmulte fosis, la akvo estus nur tiel ioma, prefere oni tie ludis tenison.

Foje venis Kostelka al mi kaj diris: „Vlado, ĉu mi povas demandi vian paĉjon, ke ni irus al via somerdometo apud la digolago de Kníničky, kunprenus grupon de bravaj amikoj, mi havas kvindek litrojn de inula vino.“ Tiumtempe en la centra presorgano de Brno, ĵurnalo Rovnost, aperadis specialaj rubrikoj (ĉar ankoraŭ ne ekzistis kaptostacioj, alivorte „ĉambretoj por ebriuloj“, kiel diras la slovakoj), simple tiun, kiu faris ian eksceson, oni kaptis, foton de lia legitimilo kopiis kaj aperigis sciigon en la ĵurnalo: sinjoro tiu kaj tiu, ekzemple Adolf Jebavý, viandisto kaj kolbasisto, nokte detruis tri randoŝtonojn de trotuaro, ĉion kun plena nomo kaj sen pardono, do por ke nin ne trafu similaĵo, ĉe la lago ĉio perdiĝos. Mi demandis paĉjon kaj tiu diris: „Ĉefe, knaboj, ne bruligu la domon, bone?“ Tial amikaro el la teatro iris al la somerdomo kaj vere portis gigantan damifonon, kvindek litrojn da vino. Ĝi pezis - kaj tia kvantego, hm, kie tiu Kostelka tion ... vinkelon ili ne havis kaj ĉi tio ne estis lia artiklo, li laboris, kiel mi menciis, pri alkoholo kaj tekstilaĵoj?

„Lubošĉjo, kia vino ĝi estas?“ kaj li

rediris: „Inula vino.“ Kaj kelkaj diris: „Aha, inula vino, nu jes.“ Kaj al tiuj, kiuj demandis, kia inula, li ne respondis, sekve ni atingis vespere la celon puraj, ne malkultitaj de ŝcioj, bruligis tendarfajron, en la dometo kolektis glasojn de mustardo, kaj nun oni verŝis. Kaj la vino estis venteta, kiel oni diras en Moravio, venteta, sed gajiga, la homoj tuj komencis kanti eĉ iu muzikis, ne havante gitaron. Laŭ gusto la vino estis interesa, nur parte ĝi gustis kiel vino, sed ankaŭ kiel griota likvoro kaj vermo, tial: „Kia estas, Luboš, la vino?“ li diris: „Inula.“ „Inula?“ kaj kiam iu demandis jam la trian fojon, la ceteraj admonis: „Lasu nin trankvilaj, se ĝi ne plaĉas al vi, ne trinku, sed ni frandas ĝin ... tra la la.“

Grandioza amuzo, fajro sputis fajrerojn, ĝis la momento, kiam el la arbaro, kien li antaŭe forpafidis, elkuris asistanto de dekoraciisto de la Ŝtata Teatro en Brno, certa Kraus, kaj elbuŝigis: „Kian fiaĵon ni trinkas?“ Ĉiuj diris: „Pri tio ni jam foje parolis, se ĝi ne plaĉas al vi, ekspedu vin for!“ - Sed li diris: „Atenton, sinjoroj, mi estis en la arbaro, kaj al mi lumas la merdo! Venu rigardi!“

Ĉiuj supoze, ke temas pri ŝerco, iris, sed terurigis! Tie sur malgranda herbejeto kuŝis io, kvazaŭ forfalinta tubo de neono. Kvazaŭ fosfora hormontrilo de preĝeja horloĝo aŭ la universala kongreso de lampiroj, koncize - io mistera.

Ni gapis kaj miris: „Kiel tio eblas?“ kaj Kraus provokis: „Nu, diru al Kostelka, ke li klarigu, kion ni trinkas! Kiu iam aŭdis pri ia inula vino?“ Kaj ĉiu parolis: „Tio estas vero, ni petas vin, kio ĝi...“ kaj subite ni ektimis, ĉar tiutempe okazadis procesoj kontraŭ fervojistoj, kiuj vidis sur sistemo, staranta en la stacio, kranion kun

skeletaj ostoj, ridis en la animo, min vi ne superruzos, ĉerpis kaj blindigis. Kaj poste mortis. Tial ni ektimis, ke ni trinkas lignan alkoholon aŭ kion, ĉar ni ne povis scii, ĉu ni vidas aŭ ne vidas, ĉar regis mallumo kiel en katakombo.

Iu diris: „Kostelka, kia estas la vino? Kaj ne ŝercu pri tio, vi ja vidas, ke la situacio estas grava.“ Kaj Luboš Kostelka diras: „Mi ĵuras al Dio, ke la baza materialo efektive estas vino, sed rigardu. Mia onklo ... al li ĝi acidigis, kaj ĉar li estas tia, nu, li eljetus ĝin, kaj ĉar mi havas neniajn vinkelojn nek tian kvanton da vino, mi diris al li, oĉjo, ne eljetu ĝin, ĝi iomete acidigis, sed ne gravas, ĉe iu okazo eblos... Kaj li donacis ĝin al mi. Kaj nia mastrumantino, kiu konas receptojn, konsilis:

Sinjoro Kostelka, en acidigintan vinon estas plej konvene meti kuracajn herbojn, tiuj eltiros la acidecon kaj ne forprenos de la vino ĝian guston. Ili aldonas nenian propran nuancon. Poste vi kribros ĉion kaj ricevos la vinon tia, kia ĝi estis antaŭ acidigo.“ Kaj Kostelka daŭrigas: „Sed mi sukcesis havigi al mi nenion alian ol la inulan arbedon.“ (Tio estas kontraŭ reŭmato.)

Li perforte enigis ĉion en la damiĵonon, kaj la vino densigis, gelatenigis, tial li kuris al farmaciistoj, tiuj donacis al li puran alkoholon, kaj li maldensigis la likvaĵon. Ŝajnis al li, ke ĝi estas tro maldensa, do li trempis la arbedon kaj estiĝis tia galimatio. Li diris: „Sed, knaboj, ĝi estas absolute sekura, pri ligna alkoholo ĝi neniam aŭdis.“

Sed ni ne plu kredis lin, ĉar la pruvo de la vero estis terura. La lumo kreskis. Kaj iu diris: „Sinjoroj, necesas doktoro!“

Mi diris: „Proksime loĝas tia, sed ne ĝuste afablulo, tiu nin ĉiam sendas ... ien.“ Tamen mi iris tien, ĉar mi timis ankaŭ pri mi mem, mi iris kaj frapis la pordon. Tie aŭdiĝis voĉo: „Kio denove?“

Mi diris: „Sinjoro doktoro, la unua helpo.“ Li respondis: „Ekspedu vin ien!“ Kaj mi ripetis: „Ne, efektive, la unua helpo.“ Sinjorino doktoredzino sufloris, ke li sendu min inferen, sed mi ne aŭdis, ĉar nia sano estis endanĝerigita. Mi diris al mi, ke mi devas ion gluti, elteni, kaj mi daŭrigis la frapadon, ĝis la doktoro elkliniĝis kaj kriis: „Homo, kion vi faras, mi vokos kontraŭ vi policon!“ Kaj mi diris: „Temas pri la unua helpo. Ni trinkas vinon, pri kiu la posedanto asertas, ke ĝi estas inula, sed ni timas, ke ni trinkas lignan alkoholon, ĉar al kamarado lumas en la arbaro lia ekskremento.“ Li diris: „Kion vi diras? Drinkaĵo, junulo, povas lumigi nur okulojn.“

Sed li ne plu restis trankvila, kiam li aŭdis pri ligna alkoholo, ĉar efektive tiaj kazoj tiam abundis, li vestiĝis, lamentis, sed iris. Kion la misteraĵo faris kun li, kiam li venis al la herbejeto, vi ne povas imagi. Li starigis, ekrigardis miajn kamaradojn, ili staris kiel funebruloj, ĉar jam projekciigis antaŭ ili la filmo, ke ili adiaŭas la familion „mi blindas kaj ne vidas“, li denove rigardis tion kaj deklaris: „Sinjoroj, la merdo efektive lumas.“ Ili diris: „Sinjoro doktoro, kaj ne ĉesas. Ni ĉi tie rigardas ĝin jam duonhoron kaj ĝi estas ĉiam pli kaj pli perfekta.“ Li proksimiĝis al tio kaj diris: „Al kiu ĝi apartenas?“

Tiu Kraus, subite enorme modesta, diris: „Tio ne valoras parolon.“ La doktoro diris: „Venu, junulo. Ĉu eble vi ĉi tie

stumblis je io?“ - „Nu, preskaŭ mi falis.“ Kaj la doktoro: „Je tiu ĉi arbostumpo, ĉu?“

Tie estis putrinta arbostumpo, kiu de si mem fosforeskis, precipe kiam ĝin injektis de malsupre tia varmego.

Ni estis feliĉaj, ke ni ne blindiĝos. La doktoro diras: „Vi devas proponi al mi por gustumi,“ kaj li gustumis ... kaj pravis. La sekvan tagon efektive lumis nur niaj okuloj.

Notoj:

inulo (latine: *Inula*) planto kultivata ĝardene por ornamaj aŭ kuracaj celoj (ĉeĥe: *oman*, popole: *vománek*)
damifono botelego por vino (Granda Vortaro Franca-Esperanta, 1992)



Vladimír Menšík (1929-1988) ĉeĥa komedia aktoro, eminenta rakontisto, unu el plej ŝatataj kaj amataj artistoj de la ĉeĥa nacio.

Luboš Kostelka, ankaŭ aktoro, aperanta ofte en televido, kvankam ne tiom populara kiel V. Menšík

PRI ŜAKHORLOĜO

Ĝis la mezo de la 60-aj jaroj de la 19-a jarcento oni ludis ŝakkonkursojn sen tempolimitado. Partio povis daŭri 20 aŭ eĉ pli multajn horojn, la rivaloj primeditis unuopajn movojn ne sporade 2 horojn. Kelkaj kviete dormetis atendante la movon de la kontraŭulo, aliaj ekscitiĝis kaj demonstre turniĝis al la publiko kun peto, ke ili veku lin kiam la opoziciulo finfine movos figureton.

La plej forta angla ŝakisto en la mezo de la pasinta jarcento Howard Staunton kuraĝis ankoraŭ pli kaj en la gazetaro publikigis, ke li dezirus ĵure akuzi tiujn el siaj rivaloj, kiuj ne kapablas lin venki kaj prefere klopodas la partion "trasidi"! Okazis eĉ komikaj situacioj. En la unua internacia turniro en Londono 1851 la ludantoj nur movis la figuretojn, dum la protokolon pri la daŭro de partio prizorgis la sekretario. En la protokolo pri matĉo Williams - Mucklow aperis jena enskribo: "La partio restis ne finita, ĉar ambaŭ ludantoj ekdormis." La banala proverbo, ke tempo estas mono, fine venkis ankaŭ en ŝako. La tempo por meditado estis energie limigita, kaj iom-post-iome estis akceptita normo; ke en la internaciaj turniroj rezerviĝas 2,5 horoj por 40 movoj de ĉiu ludanto. Por mezurado komence servis sablohorloĝoj - la mekanikaj aperis unuafoje en Parizo 1867. Temis pri simpla vekhorloĝo kaj la konsumita tempo estis por ĉiu ludanto "registrita" aparte. Speciala ŝakhorloĝo estis unuafoje uzita en Londono 1883. Ĝi konsistis el du horloĝoj kunigitaj per granda ŝaltilo, kiun unu el ili haltigis. Plie ĝi enhavis specialan nombrilon de movoj kaj sonorilon, kiu ĉiam eksonoris post certa kvanto da movoj. La projektisto de tiu horloĝo estis anglo Thomas Bright Wilson, sekretario

de la ŝaka klubo en Manchester.

La spirita patro de la nuntempa ŝakhorloĝo estis angla grandmajstro Joseph Henry Blackburne. Dek unu jarojn poste konstruis en Lepsiko Gustav Herzog la unuan ŝakhorloĝon, kiu ne moviĝis, sed estis firme kunigita per premado de butonoj kiel nuntempaj horloĝoj. La flageton sur la horloĝo rekomendis en 1899 sekretario de la nederlanda ŝaka asocio H. D. Meljer. Kvankam la tiam kutima ekzamenado per akraĵo de razilo aŭ tranĉilo, ĉu la montrilo jam efektive atingis la dekduon, kaŭzis multajn konfliktojn, daŭris multajn jarojn, antaŭ ol la kontrol-flageto estis ĝenerale akceptita en la tuta mondo.

Nun disponeblas perfektaj elektronikaj horloĝoj kaj la lastmoda modelo estas horloĝo "Chronos", inventita de usonano Fischer kaj unuafoje oficiale uzita ĉe lia matĉo kun Spasskij en 1992. Per kio diferencas la Fischera horloĝo de la klasika? En grava turnira partio ambaŭ ludantoj havas komence je dispono po unu horo. Se ili meditas, ilia tempo kompreneble kuras, sed post realigo de movo ili kutime ricevas plian minuton (depende de tio, kiu el la 8 gradoj de la horloĝo estas elektita - ludeblaj estas ankaŭ fulmaj partioj kaj rapida ŝako). Praktike tio signifas, ke foriĝas la kulminaj tempaj streĉoj, la fonto de gravaj eraroj. Chronos ne havas montrilon kaj kontrolan flageton. En alumina kesto estas instalita cola displejo kaj ruĝa lumo atentigas ludanton, ke nun estas lia vico. Tamen uzadon en ŝak-klubejoj ankoraŭ malhelpas konsiderinde alta prezo - 120 usonaj dolaroj.

Jan Kalendovskij

Jaroslav Mařík

Andreo Cseh

(1895-1995)

En nia Esperanto-Movado kreskas la nombro de centjaraj kaj pli ol centjaraj jubileoj kaj memor-datoj, post kiam la Movado mem atingis plenan jarcenton jam antaŭ ok jaroj, ne menciante la datojn el eksterlando. Nur en Starto 5/6-1994 ni vidas naŭ datonombrojn de 100 aŭ pli da jaroj en la ĉeĥa Movado. Nunjare atendas nin rememori la 100-jaran jubileon ankaŭ de fama persono de la internacia Movado, Andreo Cseh.

Jakub (Jakobo) Ĉeĥ (ĉeĥ), avo de Andreo Cseh, el la ĉeĥa urbo Bohdaneč, fine de sia labor-restado en Vieno estis sendita, post la revolucia jaro 1848, en Transilvanion, tiam orientan parton de la Aŭstri-Hungara imperio, ĉar tie la hungaraj oficistoj estis strikantaj. - Tie naskiĝis la 12an de septembro 1895, en Marosludas, la nuna rumana Ludoŝul de Mureŝ, al Otto Felix, filo de Jakobo Ĉeĥ, kaj hungara edzino Gabriella Komáromy de Belenyeŝ, filo Andreo. (La „y“ en ŝia nomo atentigas pri nobela-kvankam malalta deveno, simile kiel ĉe Baghy, Kalocsay, Ferenczy). La hungara pastro laŭkutime madjarigis la nomon de la knabeto de Ĉeĥ al Cseh (cs = ĉ). Sub tiu nomo la juna Adreo famiĝis en Esperantio.

Andreo, malgraŭ ke li estis edukita de la patrino en la madjara lingvo kaj studinta la universitaton en Budapeŝto, sopiris scii veron pri siaj ĉeĥaj antaŭuloj, kaj tial li dum sia restado en Pardubice, 1925, petis d-ron Fousek en Přelouč provi trovi liajn ĉeĥajn parencojn. En la afero helpis ankaŭ s-ino Grossmannová-Vamberová. En 1980-81, laŭ instigo de

Ed Borsboom, amiko kaj biografiisto de Cseh (la biografio estas aperonta nunjare) plu serĉi mi utiligis la afablecon de s-ino Jarmila Rybáčková (Rýznarová) en Pardubice. Tiu eĉ sondis en la ŝtata arĥivejo en Zámrsk kaj plu en Bohdaneč kaj Probluz. Ni nun konas la nomojn de vico da Cseh-parencoj kun la nomo Ĉeĥ. Ekz. unu el la nevoj de la avo Jakobo estis prof Leander Ĉeĥ, mezlerneja direktoro en Telč, konata kritikanto en la ĉeĥa literaturo.

La vigla junulo Andreo fariĝis esperantisto en 1911 kaj pastro en 1929, tamen liberigita de la episkopo pri pastraj devoj por sin dediĉi al poresperanta laboro. En 1920 li ellaboris en Sibiu (Rumanio) novan metodon de kursgvidado, kunfondis Rumanan E-Centron kaj sekretariis en Internacia Centra Komitato. Li inventis la t.n. rektan metodon por instruado de esperanto, la li nomitan CSEH- aŭ ĈE-METODO. Ĉe tiu metodo la kursestro ne konas la nacian lingvon de la kursanoj. Tio iom memorigas la metodon de J.A.Komenio „schola ludus“ - lernejo per ludo, aŭ instruado kvazaŭ ludo.

Andreon Cseh ni konas kiel la plej grandan pedagogon en la E-Movado. Laŭ indikoj de Ed Borsboom por la dua eldono de la Enciklopedio de E., Cseh per siaj Ĉe-kursoj akiris subtenon de multaj aŭtoritatuloj kaj havigis al la Movado ĉ. 140 000 novajn adeptojn. Liaj kursoj preskaŭ sensacie elstaris pro la partoprenanto-nombro pli granda ĉe la kursfino ol ĉe la komenco. La gazetaro parolis pri „renesanco de E-o“. - Bedaŭrinde, kiom da freŝbakitaj esperantistoj restis el tiuj miloj? Evidente, la Ĉe-metodo scias rapide allogi, sed ankaŭ forgesigi sen necesa plua ioma

studo „normala“. /-- Tomáš Pumpr en sia „Balado pri Ĉe-instruisto“ gaje prisatiras fervoran Ĉe-instruiston Sigismundon Praganon (Ligilo, Prostějov, 6 - 8, p. 36).

Cseh gvidis ankaŭ internaciajn seminariojn pedagogiajn, 1929 - 1939, en kelkaj landoj (Budapest, Arnhem, Krakovo). Loĝante en Nederlando, de 1929, li fondis en majo 1930 kun ges-oj Isbrücker Internacian Cseh-Instituto (de 1952: Internacia Esperanto-Instituto), kun la celo eduki Cseh-metodajn instruistojn. La instituto poste fariĝis pli kaj pli fokuso de E-a kulturo. Ĝi liveris al la movado ĉ. 600 diplomitajn Cseh-instruistojn, kiuj laboris en 28 landoj (ekz. niaj K. Šolc en Belgio kaj D. Bartošík, en Jugoslavio kaj Nederlando, kie li edziĝis al nederlandino). Pro granda sukceso de la unua internacia seminario la urba estraro en Arnhem disponigis vilaon kun parko por kursoj kaj konferencoj de la Instituto. La „Esperanto-domo“ posedis ĉiujn apartenaĵojn; tie okazis regule kursoj kaj seminarioj por E-instruistoj.

En la jaroj 1932 - 1964 Cseh fondis kaj redaktis la monatan gazeton „La Praktiko“, de 1942 organon de Universala Ligo cele de edukado de la homa socio.

Tre efika iĝis la uzado de propra tutmonda mونسistemo de la simple sentebla enletero. Uzata ankoraŭ en la 70-aj jaroj. La Instituto larĝskale propagandis la internacian lingvon en fakaj medioj (ekz. mondfederalistoj), eldonis librojn, aranĝis denove seminariojn por instruistoj.

Pro sia poresperanta valoro A. Cseh estis longtempe membro de la Akademio de E-o kaj ankaŭ ĝia vicprezidanto.

La meritoj de Andreo Cseh kuŝas - laŭ difino de Ed Borsboom - en:

1) instrumentado, 2) didaktika laboro, 3) grandskala akirado de novaj esperantistoj, 4) favorigado de aŭtoritatuloj, 5) eldonado de „La Praktiko“, 6) eminenta oratoreco (simila al Privat kaj Lapenna). Li ankaŭ donis sistemon pri la elparolo de Esperanto; 7) verkado de bona prozo.

(Vidu ankaŭ „La deveno de A. Cseh“, Starto 1/1981, p. 15-16, de la sama aŭtoro.)



Tomáš Pumpr Balado pri Ĉe-instruisto

(Pamfleto kun tragika fino.)

Kaptas min ĉe klink' de knara gurdo
por amuzi plebon de bulvard',
kaj mi kantas pri terura murdo,
mi, popola, foir-festa bard':

Vivis foje hom' en urbo Prago,
Sigismundo estis lia nom';
li dediĉis sin en unu tago
al la Esperanto-idiom'.

Iam aŭdis li Ajayion Kolan,
viron kun la nigre nigra haŭt'.
La prelegon Esperant-parolan
li plezure kvitis per aplaŭd'.

Sed li ploris laŭte kun lamento,
ke la sankta Esperanto-kult'
en Afrika nigra kontinento
tiom longe restas sen rezult'.

Ne sufiĉas unu Ajayi Kola
parolanta en la Esperant',
se li restas preskaŭ unusola
en la tuta vaste vasta land'.

Kaj li diris: „Verdan propagandon
oni devas fari laŭ sistem’:
travojaĝi la Afrikan landon
tra kaj trae! Kaj mi iros mem!”

Li pilgrimi devis sur kamelo
trans dezerta sablo de Sahar’,
ĝis li fine venis al la celo
en la indiĝena praarbar’.

Ho ve, kial la Fortun’ fatala
antaŭ morto ne avizis lin?
Car sovaĝa gento kanibala
en la praarbar’ surprizis lin.

Ili kaptis lin kaj en vilaĝon
trenis lin sur malfeliĉa voj’
kaj tie lin metis en la kaĝon...
Estis vane plori: „Ho ve, oj!”

Ili volis laŭ kutim’ Afrika,
laŭ konata kanibala mor’
lin grasigi kaj lin nutri dika,
poste buĉi lin kaj manĝi for.

Tamen ili tion ne atendis,
ke ne manĝos la esperantist’:
vane ili ja frandaĵojn sendis,
li surprizis ilin per rezist’.

Tio estis tre, tre malagrabra,
ĉar pro larmoj kaj melankoli’
li maldika iĝis, iĝis magra,
ĉiun sian grason perdis li.

„Kial, viro, vi ne ĉesas larmi?”
lin demandis la ĉef-kanibal’. -
„Ĉar ne povis realiĝi al mi
mia Esperanto-ideal’.

Mi ne timis trans la maron vadi,
por alveni fine al la cel’:
Esperanton al vi instruadi
kaj vin varbi por la Verda Stel...”

„Do atendu iom en la kaĝo”
- petis lin la kanibala ĉef’ -
„Ke ne estu vana la vojaĝo,
realiĝos via vivo-rev’.”

Kaj nun ĉio sin komencis ŝanĝi,
ĉesis larmoj, ĉesis „ve ho ve!”
Kaj li rajtis kurson ekaranĝi
laŭ metodo de Andreo Ĉe.

Elegante, forte kun kuraĝo
lernis tuta kanibala gent’.
Instruisto sidis en la kaĝo
kaj instruis kun temperament’.

Lia klaso montris sin talenta,
kaj li post la deka lecion’
estis dika, estis korpulenta
kaj rondforma kiel la melon’.

„Mi deziras bonan apetiton...”
estis lia adiaŭa fraz’ -
Kaj ili komencis sian riton
preparante spicon por kolbas’.

Tia estis fina leciono,
tia estis lia vivofin’...
Ili lin kuiris en kaldrono
kaj distranĉis kaj formanĝis lin.

Nur la koron ili semis plante
laŭ la pet’ de lia testament’,
„kaj ĉirkaŭ ili kantis Esperante:
„En la mondon venis nova sent’.”

„Ligilo”, 6-8, 1939
Prostějov

Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature (4)

Josef Kavka

-ED- kaj -ET-

Kvaravice (v. STARĤO 4-1994, p. 20-21, 5/6-1994, p. 23-26, kaj 1-1995, p.) ni dediĉu atenton al okazoj, kie fontlingva radikfina -ET- estas modifita per -ED-, por eviti koincidon kun la sufiksa -ET-.

Da fundamentaĵoj tiaspecaj ni trovis sole 5. (Enkrampe ni listigas po 2 etnolingvaj ekvivalentoj):

- bufedo (*fr: buffet, it: buff etto*)
- bukedo (*fr: bouquet, ro: buchet*)
- cigaredo (*fr: cigarette, de: Zigarette*)
- pikedo (*fr: piquet, it: picch etto*)
- planedo (*fr: plan ete, la: planeta*)

Nia Majstro evidente timis la homonimecon de bufet-o kun buf-eto, de buket-o kun buk-eto, de cigaret-o kun cigar-eto, de piket-o kun pik-eto kaj planet-o kun plan-eto. Sen analizi, ĉu lia timo estis prava, ni tuŝu almenaŭ unu problemon, kiu estiĝas pro lia -ED-: Nek Fundamento, nek PIV konsilas al ni, kiel esperantigi terminojn parencajn al „planedo“. Ĉu teni konsekvence la misforman -ED- ekz. por „planedoido“ (*de: Planetoid, en: planetoid, fr: plan etoide, it: planetino, ru: planetoid*)? Ĉu same procedi okaze de „planedario“ (*de: Planetarium, en: planetarium, fr: plan etarium, it: planetario, ru: planetari*)? Aŭ rezigni pri la misformado kaj imiti la etnolingvajjn, absolute internaciajn formojn kun -ET-?

Inter oficialaĵoj kun -ED- apenaŭ iu nin interesus. Eble kaskedo, kiun oni deziris distingi disde la fundamenta kask-eto. Nu, ĉar ne temas pri naturhistoria

nomenklaturaĵo, ni lasu la problemon al specialistoj pri kapvestado ...

Da neoficialaj PIVaĵoj estas 10:

1. arbedo certe devus ne konfuziĝi kun arb-eto. Tamen, el vidpunkto nomenklatura (ne komunuzo), la botanikistoj eble preferus la terminon frutiko (*la: frutex*); kp. la PIVan, kvankam dubindan ekvacion: fruteska = arbusteca. El frutiko oni facile derivus la terminojn: duonfrutiko (*la: suffrutex*, ekz. peonio arbeca), fr.tiketo (ekz. eriko), frutikeca k.t.p.

2. bankedo (*en + fr: banquet*).

Ĉu banket-o povus kuntekste kolizii kun bank-eto? Eble en jena ŝerca frazo: „En la banko oni okazigis banketon?“

3. barbedo (*fr: barbette*), 4. bonedo (*fr: bonette*) kaj 5. etikedo (*fr:  tiquette*). Sen komentoj ...

6. kasedo (PIVS, sed ankaŭ Pekoteko 87/182). Ĉi-okaze regas kaj eble regos malunuco por difini kasedon, kaseton, kazeton ...

7. kornedo (*fr: cornette*). Sen komento.

8. paledo (PIVS, *en: pallet*). Ĉu ne sufiĉus la termino absolute internacia: paleta? Kiel oni esperantigos la anglan verbon *palletize*, la participon *palletized (trafic)*, la substantivon *palletization*? Ĉu ilin misformi per -ED-?

9. rakedo. Ĉu la oficiala raketo ne tolerus la trian (pilkojetan) signifon, kiu estas internacia?

10. renedo (*fr: reinette*). Ĉu la pomvario povus konfuziĝi kun malgranda reno? Jen ridinda homonimfobio...

Ĉi-loke necesas atentigi, ke en PIV ekzistas nomoj, prave esperantigitaj kun la radikfina -ED-. Kiel ekzemploj servu almenaŭ jenaj 2: stapedo (*la: stapes, -edis*) kaj teredo (*la: Teredo*).

Male, en EB (1988) ni trovas la terminon „ĉaledo“ (*fr: chalet*), kiu estas

misformita pro enigma motivo. Samloke troviĝas „nevedo“ (fr: *navette*) apud la sinonima: naveto kaj fine „plakedo“ (en + fr: *plaque*). Pri ĉiuj ĉi tri -ED-ajoj eblas prave dubi.

Aliflanke ĝojigas nin la fakto, ke abundas en PIV vortoj nemisformitaj, do tiuj kun la radikfina -ET-:

El la fundamentaĵoj ni menciu: aĉeti (fr: *acheter*), alumeto (fr: *allumette*, el la latina verbo: *alluminare*), epoeto (fr: *épaulette*), gazeto (it: *gazetta*), klameto (fr: *clarinette*, el la latina substantivo *clarum*), koketa (fr: *coquet*, derivita de l'onomatopeo kokokria), kvieta (la: *quietus*), magneto (la: *Magnes*, -etis), pargeto (fr: *parquet*), portreto (fr: *portrait*), profeto (la: *propheta*), ripeti (it: *ripetere*), sekreto (la: *secretum*), societo (la: *societas*), tapeto (it: *tappeto*), trumpeto (it: *trombetta*), tualeteto (fr: *toilette*), vegeto (la: *vegere*, *vegetus*).

Kiel zamenhofajn, PIV registras ankoraŭ: blanketo (fr: *blanquet*) kaj ruleto (fr: *roulette*).

Konstateble, Zamenhof lasis la radikfinan -ET-, malgraŭ eblaj okazoj de homonimeco: aĉ-eta, kok-eta, blank-eta, rul-eta. Okaze de „pargeto“, li ne lanĉis „parked-“, sed alimaniere evitis la koincidon inter parket-o kaj park-eto.

Inter la vortoj oficialaj ni trovas:

1. baleto (it: *ballétto*, el la latina verbo *bakare*),
2. etiketo (kp. la supran: etikedo),
3. kometo (la: *cometa*),
4. korneto (it: *cornétto*, el la latina: *cornu*),
5. korseto (fr: *corsét*),
6. korveto (fr: *corvette*, la: *corbita*),
7. raketo (fr: *raquette*, la: *rocheta*),
8. soneto (it: *sonétto*, la: *sonus*),

9. terceto (it: *terzétto*).

La homonim-okazoj estas evidentaj: bal-eto, etik-eto, kom-eto, (do ne komedo laŭ la precedentaj: planedo), korn-eto, kors-eto, korv-eto, rak-eto, son-eto.

Fine prezentiĝu konsiderinda nombro da neoficialaj PIV-ajoj: aneto (*Anethum*), boleteto (*Boletus*), ekvizeto (*Equisetum*), gameto (el: *gamete*), kabareto (fr: *cabaret*), kareto (*Caretta*), kaseto (it: *cassétta*), kateto (la: *cathetus*), kvinteto (it: *quintétto*), limeto (fr: *limette*, la: *lima*), menueto (fr: *menuet*; ĉi-okaze atentindas, ke la danĉonomo, samkiel la manĝaĵoj menuo (fr: *menu*), devenas el la latina *menus*; miceto (el: *mikes*, -etos), mineto (fr: *minette*), nepeto (*Nepeta*), pipeto (fr: *pipette*), spageto (it: *spaghétto*), tanaceto (*Tanacetum*).

Denove ni konstatas, ke prave restis la radikfinaj -ET-, spite al multaj homonimoj: an-eto, bol-eti, gam-eto, kar-eta, kas-eto, kat-eto, lim-eto, menu-eto, min-eto, nep-eto, pip-eto.

Do, ĉar ekzistas nek fundamentaj, nek oficialaj, neoficialaj precedentoj por misformi per -ED- ekz. botanikan aŭ zoologian nomon, ni povas bonmotive „profeti“, ke ankaŭ future konserviĝos la bona kutimo, lasi en la nomenklaturajoj ĉiam la radikfina -ET-, neglektante eventualajn okazojn de homonimeco.

Fontoj:

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (1970), Sennacieca Asocio Tutmonda, Paris

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Suplemento (1987). - Sennacieca Asocio Tutmonda. Paris.

Esperanta Bildvortaro (1988). R. Eichholz. - Esperanto-Press, Bailieboro.

Inversa Vortaro de Esperanto (1989). B.

Pabst. - Esperanto-Centro, Paderborno.
Plena Pekoteko 85-90, Volumo I, II, III
(1992). *R. Eichholz.* - Esperanto-Press,
Bailieboro.

Nia fervojo

El Tábor kondukas la unika fervoja linio tra interesa pejzaĝo al la banurbo Bechyně. Ĝi estas la unua elektrizita interurba trako en la meza Eŭropo. (Ekzemple la linio en aŭstria Marizel estis elektrizita nur en la jaro 1911, do post 8 jaroj.) Jam en la naŭdekaj jaroj de la pasinta jarcento estas la urbo Bechyně konata pro sia baneja gastemigado kaj multaj memorindaĵoj. Tial ekestis kooperativo, kiu penadis pri fervoja interligo kun Tábor. En la jaro 1896 antaŭmetas la landa konsilisto Dostál al la landa parlamento la proponon de la fervoja kunigo. La unua projekto proponis vaporlokomotivojn kiel kutime en aliaj kazoj. En la sama tempo provas elektran transmision ĉe fervojo la ĉeĥa „Edison“ František Křižík. En la jaro 1898 la kooperativo decidis pri la peto al la investisto pretigi la projekton de la elektrizita trako. Sekvis komplikaj intertraktadoj kaj nur en aprilo 1902 oni subskribis la kontrakton. Sed anticipe de januaro oni elaçetadis terpecojn por konstruo de la linio. Pro rapida antaŭeniĝo oni permesis faciligaĵojn - krutaj supreniroj kaj grandaj kurbaĵoj de la trako, kiuj ĝis hodiaŭ malaltigas rapidecon de la trafiko. Tiel oni evitis konstrui grandajn pontojn kaj trafosaĵojn. Do necese estis konstrui nur elektran centrejon kaj ponton trans la riveron Lužnice - ambaŭ en Tábor. Por pli bona ekspluatado de la elektra centrejo oni produktis kurenton tage po: lokomotivoj

kaj nokte por prilumi la urbon. La ponto estis konstruita ŝtala kaj kunigita per nitoj. Laboro tiam daŭris nur 4 semajnojn. Super la trako kondukis (nuntempe ne plu videbla) duobla troleo pendigita en lignaj portaloj. La du unuaj lokomotivoj inaŭguris trafikon la 21-an de junio 1903, t.e. post unu kaj kvarono de jaro de post ekkonstruado.

Sed bedaŭrinde kiu volis vojaĝi ĝis Bechyně, devis trairi piede klopodan vojon tra profunda valo de Lužnice, antaŭ kiu staris la stacidomo. Nur en la jaro 1928 estis konstruita ŝtalbetona belulo, 50 metrojn super la nivelo de Lužnice, kiu ebligis facile atingi la urbon. Baldaŭ kreskado de la trafiko devigis konstrui du pluajn lokomotivojn. Tiuj ĉi kvar maŝinoj servis daŭre ĝis la jaro 1939 - do 36 jarojn. Ja ĝis nun oni povas spekti la numeron „tri“ okaze de la solenaj veturoj.

En 1993 ni jam solenis la 90-jaran datrevenon de ektrafikado. Laŭ la plej novaj informoj ekzistas streboj rekonstrui ordinaran tramon por la bezonoj de la fervoja trafiko. Oni antaŭvidas, ke la tramo bezonus nur duonon da tempo kaj ŝparus 30 procentojn da elektra energio.

František Benák

Programo ĈAPELILO

Gazetoj kaj libroj en nia tempo estas kompostataj per komputiloj, helpe de diversaj programoj, kiuj scias imiti la klasikan metal-literan kompostadon. La programoj enhavas kelkcent instrukciojn, kiuj ebligas ŝanĝadi tipon kaj grandecon de skribo, formaton de paĝo, aranĝi tekstojn laŭ kolumnoj, enkondukadi bildojn, kopii kaj kunmetadi tekstojn kaj multajn aliajn magiaĵojn de la moderna pres-arto. Tamen ne ĉiuj kompost-

programoj disponigas ankaŭ la Esperantajn literojn (ĉ ŝ ĝ ĵ ĥ ŭ), kaj iliaj instrukcioj kutime aperas en la angla lingvo. Firmao *Professional Consulting* (s-ro PEJNO Simono, Am Füllgarten 4, D-61250 Usingen) lanĉis novan programon nomatan CAPELILO 1.0, evoluigitan por kompostado en Esperanto. Ne nur la skribo, sed ankaŭ ĉiuj instrukcioj estas esperantlingvaj, ekzistas literoj ankaŭ por aliaj lingvoj. La programo laboras sub Vindozo 3.0 (Windows) kaj enhavas vortaron de 120 000 vortoj por kontroli tekstojn, eblas ankaŭ kunlaboro kun aliaj programoj (interŝanĝado de tekstoj kaj bildoj). Se vi posedas IBM-kongruan komputilon kaj 200 germanajn markojn (plus iom por ekspedo), vi povas paroligi vian maŝinon internacilingve.

(laŭ gazeto Monato 5/1995)

OFICIALA INSTRUPROGRAMO DE ESPERANTO EN SLOVAKIO

La 4-an de marto 1993 la Ministerio pri Instruado de Slovaka Respubliko aprobis la dokumenton „Instruprogramo por gimnazioj. Internacia lingvo Esperanto. Nedevisa studobjekto - unujara kurso“ sub registra numero 828/1993, kiel duan korektitan eldonon (la unua aperis jam septembre 1990). Tiel estis en Slovakio oficiale aprobita la nedevisa instruado de Esperanto. La tekston ellaboris prof. Eduard Gašinec el Pedagogia Esplorinstituto de Bratislava.

La teksto klarigas, kion la instruado celas (paroli, skribi, aŭskulti en Esperanto pri ĉiutagaj temoj, konatiĝi kun literaturo kaj historio de Esperanto), kion enhavu ĉiu el la 70 instruhoroj de la unujara kurso, kiuj metodoj kaj lerniloj estas disponeblaj kaj kiel taksu la sciojn de la lernantoj. Sekvas listo de aplikitaj

pedagogiaj verkoj.

La dokumento estas la unua hirundo sur la teritorio de la iama Ĉeĥoslovakio, sed bedaŭrinde en Slovakio mem ĝin eĉ esperantistoj ne rimarkis (recenzoj aperis nur slovaklingve, verkitaj de la aŭtoro), kaj ĝia praktika apliko en gimnazioj estas nula (almenaŭ neniu konkreta ekzemplo estas menciita en la recenzoj). Jen ekzemplo, ke ne sufiĉas, se oficialaj lokoj malfermas la pordon al esperantistoj - ni ofte ne scias proponitajn eblojn utiligi.

(mm)

PEDAGOGOJ

Abono al ILEI kaj IPR

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj eldonas kvarfoje en jaro la gazeton Internacia Pedagogia Revuo (formato A5, 36 paĝoj) kun artikoloj pri Esperanto-instruado. La membreco en ILEI estas samtempe abono al IPR. La normala kotizo estas 100 svedaj kronoj, sed estis interkonsentite, ke niaj membroj pagu 100 ĉeĥajn kronojn al subkonto de ĈEA (variebla simbolo 789.71).

Ĉar en 1996 okazos en Prago la Universala Kongreso, ILEI utiligos sian monon deponitan ĉe nia asocio. Tiam ni ankaŭ pridiskutos la futuron de la ĉeĥa ILEI-sekcio. Kiuj volas membriĝi al ILEI kaj aboni la pedagogian revuon, sendu 100 Kč al ĈEA kaj fotokopion de stampita poŝtpagilo al la kasisto de ILEI: Bertil Andréasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby, Svedio.



Korekto pri la memortabulo en Františkovy Lázně

La artikolo de la prezidanto Vlastimil Kočvara pri la monumento (Starto 1/1995, p. 4) enhavis plurajn erarajn informojn, kiujn ni korektas laŭ la atentigo de J. Vaněček, la prezidanto de Asocio de Esperantistoj Handikapuloj (AEH):

La unua memortabulo estis instalita en 1991 dum la kongreso de handikapitaj esperantistoj en Františkovy Lázně (ne en 1992, kiam okazis la monda kongreso de AEH en la sama urbo). En 1991 ne plu ekzistis „la samnoma sekcio de ĈEA“, sed jam estis registrita la nova memstara asocio AEH, evoluinta el la menciita sekcio. ĈEA eĉ ne parte financis tiun memortabulon, rifuzinte la peton de AEH, ĉar ĈEA planis instali alian monumenton, kiu pli fidele memorigus la originan de 1914 (tiu estis dediĉita ne al Zamenhof, sed al Esperanto).

La skulptisto Josef Hrcuba preparis novan monumenton enhavantan bildon de la origina, kaj ĈEA kolektis monon por ĉi tiu verko.

La instalo de la memortabulo fare de handikapuloj estis surpriza kaj nuligis la planon de ĈEA. Tial la ĈEA-estraro komence iom koleris, sed fine silente ĝojis, ĉar por la projekto de Hrcuba ne kolektiĝis sufiĉe da mono. En junio 1994 ebria metilemano la memortabulon detruis (eble en la okcidenta Bohemio incitas la germana nomo de nia Majstro?) kaj nur post 10 monatoj en aprilo 1995 AEH sukcesis instali novan tabulon, nun el nerompebla materialo. Por ĉi tiu nova tabulo jam kontribuis ankaŭ ĈEA per 8 mil kronoj, kiuj restis de la monokolektado. (mm)

Romeo, Julieta kaj Esperanto

La Esperantista Grupo de Verona (Italio) aranĝos Internacian Esperanto-Festivalon, kiu okazos en Verona, en junio 1996. La temo de la Festivalo estos: „Universaleco de la legendo de Julieta kaj Romeo - Universaleco de la Internacia Lingvo Esperanto“.

Enkadre de la riĉaj kaj variaj festivalaj programoj, la organiza komitato, sub gvido de Salvatore Argentino, lanĉas ankaŭ pripoezian, esperantlingvan konkurson, al kiu povas partopreni kiu ajn esperantisto, el kiu ajn lando, per alsendo de unu ĝis tri poemoj, ĉiu en 6 kopioj, el kiuj nur unu surhavu la nomon kaj adreson de la konkursanto. La poemojn oni alsendu al jena adreso: Gruppo Esperantista Veronese, C. P. 1616 Verona, Italio, plej malfrue ĝis la 31-a de decembro 1995.

Internacia juĝkomisiono, kies sekretario estas Aldo de'Giori, atribuos premiojn, kiuj konsistas el diplomoj, oraj medaloj kaj senpaga restado en Verona dum la Festivalo.

Aldo de'Giorgi

Jiří Karen 75-jara

Nia kara poeto ĉehlingva kaj esperantlingva, propranome Ladislav Podmele, naskiĝis 11. 6. 1920 en Litomyšl. Unue li lemis negoci pri libroj (1935-37) en Vysoké Mýto kaj nur kiel dudekjarulo ekstudis la superajn gimnaziajn klasojn en Hradec Králové (1940-42). En 1942 sendita en Germanion por deviga laboro (Magdeburg, Halle, Nordhausen), li povis abituriendi nur en 1945. Sekvis filozofia fakultato (filozofio kaj historio) ĉe Karola Universitato en

MIRIAPODO PERLABORIS 33 MILIONOJN

Komence de la ĉijara januaro telefonis al sinjorino Jensen iu entreprenisto kaj indignite sciigis al ŝi, ke kiam li pasintjare ne ricevis proponon por la novjaraj salutbildoj, li opiniis, ke la kampanjo jam iniĝis. Sed nun li ricevas la salutkartojn de siaj komercaj partneroj. Tial li petas, ke ankaŭ li estu senprokraste envicigita inter la abonantojn por la venontaj jaroj. La evento okazis en Norvegio kaj temis pri pentraĵoj de ĉeĥaj kaj slovakaj infanoj.

Běla Jensen estas laŭdevene ĉeĥino. Kiam printempe 1990 post 21 jaroj ŝi denove revenis en la patrujon, petis ŝin amikino helpi eksterlande akiri ekipaĵojn por niaj hospitaloj. Sinjorino Běla jesis. Sed kiamaniere ĉion

aranĝi por ne starigi la ĉeĥojn en rolon de tiuj, kiuj almozas kun etendita mano? Kaj ke la helpo ne venu nur tiel facile, senpage? Ĉar kion ni ricevas senpage, tion ni apenaŭ estimas. Sinjorino Běla venis kun ideo alvoki ĉeĥajn kaj slovakajn infanojn pentri kristnaskajn bildojn kaj disvendi ilin en Norvegio kiel novjarajn gratulojn. Samjare antaŭ la Kristnasko en dudekgrada frosto sinjorino Jensen staris antaŭ grandmagazeno kaj vendis la unuajn bildetojn. Nia tiutempa ambasadoro en Norvegio Igor Kratochvíl ne povis kredi, kiam la sciigo pri la stranga samlandanino atingis liajn orelojn. Li igis kontroli ŝin antaŭ la grandmagazeno. Poste li lasis sin infekti de la freneza ideo. Kaj nun, kiam li vivas denove en Prago, li apartenas al ŝiaj ĉefaj helpantoj.

La originala kampanjo ricevis la nomon „Sur la propraj piedoj“ kaj ĉarman miriapodon kiel emblemon. Iom post iom aliĝis ĉirkaŭ du miloj da bohemiaj, moraviaj kaj slovakiaj lernejoj. Sinjorino Jensen ne plu staras sur trotuaro, sed preskaŭ ĉiutage ŝi oficas dum sennombraj horoj en sia domo plenshopita de pakajoj da bildoj kaj de mendoj fare de firmaoj. Sendi anstataŭ ordinara salutkarto novjaran infanan pentraĵon fariĝis afero de prestiĝo. Norvega financa gazetaro skribis tion rekte „sen-ceremonie“ - se vi ne ricevis novjaran saluton de ĉeĥa aŭ slovakaj infano, vi ne estas grava firmao.



La vendado de bildoj kaj donacoj, kiujn norvegoj ravitaj de lerteco de niaj infanoj de tempo al tempo almetas, jam atingis valoron de nekredeblaj 33

milionoj da kronoj. Oni aĉetas per ili ekipaĵojn por ĉeĥaj kaj slovakaj hospitaloj (la disfalo de la ŝtato ne ŝanĝis la komunan movadon).

Dum en la lernejoj la geknaboj modeste desegnas kaj pentras, niaj politikaj reprezentantoj verŝajne tute eĉ ne supozetas, kiel la infanoj famigis nin en Norvegio. Haavard Engel, aŭtoro de koreografio de la inaŭgura kaj ferma programoj de la norvega vintra olimpiko, komponis pri niaj pentrantaj infanoj kaj pri ilia miriapoda movado pop-operon. Kaj en la antaŭ nelonge okazinta porinfana soleno estis tri niaj infanoj (po unu el Bohemio, Moravio kaj Slovakio) solaj kaj tre estimataj eksterlandaj partoprenantoj. Akceptis ilin ankaŭ la ministrino pri familio Grete Berget kaj parlamentano Anders Sjaastad.

Se via infano malsanos, povas okazi, ke por diagnozado aŭ kuracado helpos lin aŭ ŝin ĝuste aparato aĉetita „per bildetoj“. Sed vi verŝajne ne scios tion. Simile oni ne scias nialande, ke en Norvegio oni diras pri niaj infanoj, ke ili helpas resanigi per siaj pentraĵoj ne nur aliajn, malsanajn infanojn, sed eĉ la tutan mondon. Ĉar ili pensigas ĝin pri graveco de la aferoj.

Marie Klírová

Solena renkontiĝo de handikapuloj en Skokovy

Malgranda vilaĝo Skokovy en Ĉeĥa paradizo estis loko, kie esperantistoj, handikapuloj, solenis la 10-an naskiĝtagon de sia organizaĵo kaj aranĝis ankaŭ lingvan seminarion.

Vendrede la 31-an de marto estis alvetura tago, kaj interkona vespero. Sabate la 1-an de aprilo estis solene inaŭgurita paroliga staĝo kaj posttagmeze ni promenis en ĉirkaŭaĵo. Vespere ni havis eblecon interparoli kun samideanoj Josef Vaněček, Drahomír Kočvara kaj doktoro Josef Hradil, kiu staris ĉe lulilo de la asocio. Dimanĉe estis festita dekjarigo de la agado de esperantistoj-handikapuloj. Ĉiuj posttagmezoj estis liberaj. Ni povis promeni, kanti, ludi, eĉ gimnastiki kaj por interesantoj estis ebleco ankaŭ uzi kurac-banojn kaj masaĝojn. Vespere profesoro Mráz prelegis pri stelkonstelacio. Lunde jam komenciĝis studado en rondetoj. Tiun por komencantoj gvidis J. Filip, kaj la progresintojn gvidis L. Filipová. Vespere estis tribuno pri temo „La 50-a datreveno de la fino de la 2-a mondmilito“. El 10 skribaj travivaĵoj estis elektitaj tri la plej bonaj, kiuj ricevis premion. Vi povos ilin legi en Informilo (*abonebla gazeto de la*

Asocio de esperantistoj-handikapuloj: rim. de la redakcio). Krom ĉiutaga studado kaj promenado ni havis eblecon ankaŭ amuziĝi per ludoj kaj konkursoj, vidi diapozitivajn el Francio kaj denove aŭdi prelegon de profesoro Mráz pri vojaĝado. Vendrede vespere ni adiaŭis per amuza vespero kaj sabate frumatene ni eksidis en aŭtobuson kaj vojaĝis al Františkovy Lázně, kie estis denove devualita memor-tabulo de Dr. L. L. Zamenhof, kiu estis jam dufoje detruita. Ni dankas al ĉiuj, kiuj permone subtenis la ideon, starigi la unuan monumenton en la mondo al la sama loko.

L. Filipová

Anekdotoj

La plej granda timulo

Tri knaboj iras surstrate. Unu diras: „Ĉu vi scias, kia timulo estas mia patro? Se oni sonorigas vespere ĉe ni, li ĉiam kunprenas tranĉilon kaj malfermonte unue demandas: Kiu estas?“

Dua: „Mia patro havas ĉiam hakilon en la lito. Kiam li aŭdas bruon sub nia fenestro, li svingante per hakilo krias: Se vi grimpas sur la fenestron, mi frakasos vian kapon.“

„Bagatelajo! Mia patro tiel timas, ke li ĉiam, kiam mia patrino nokte laboras, foriras dormi al nia najbarino.“

Manovroj

Generalo: „Leŭtenanto, kial vi ne havas kompason?“

Leŭtenanto: „Via generala moŝto, mi opiniis, ke dum suna vetero, ĝi ne estas necesa.“

Generalo: „Homo, ĉu vi estas stulta? Laŭ suno vi ekscios sole, kie estas sudo, sed kiel vi trovos nordon, he!“

(jm)

SEZNAM ZBOŽÍ

nabízené prodejnou Českého esperantského svazu v Praze pro rok 1995
Níže uváděné zboží si můžete objednat na adrese:

E S P E R A N T O - LIBROSERVO
Český esperantský svaz
pošt. příhr. 1069, 111 21 P r a h a

Při větších nákupech poskytujeme slevy jak klubům esperantistů tak i jednotlivým členům ČES. Slevy poskytneme i tuzemským knihkupcům. Ceny v tomto seznamu jsou uváděny v Kč. Některé zboží je na skladě pouze v omezeném množství. Objednávky budeme vyřizovat v pořadí, jak nám dojdou, až do vyčerpání zásob. Při zásilkové službě (posílání zboží poštou) připočítáváme k ceně zboží expediční náklady (tj. poštovné a balné).

Poskytované slevy:

Při odběru zboží	
nejméně za	se poskytuje sleva
100,00 Kč	10%
500,00 Kč	15%
1000,00 Kč	20%

Těšíme se na Vaše objednávky!

A nejdřív tři NOVINKY:

LS 001 = 95.00
K. Čapek: Milito kontraŭ Salamandroj
Známy čapkův román, který dodnes neztratil nic ze své aktuálnosti, ve výborném překladu známého esperantského učitele a překladatele J. Vondrouška

LS 002 = 32.00
M. Malovec: 25 jaroj de ĈEA 1969 - 1994
Nová ročenka ČES, vydaná k 25. výročí ČES. Kromě stručných údajů o poslání a dějinách svazu jsou zde publikovány nové adresáře českých klubů esperantistů, sekci ČES a jeho hlavních členů. Vhodné i pro neesperantskou ve-

řejnost, nejdůležitější historické údaje jsou dvojjazyčné.

LS 003 = 126.00
J. Hašek: Ne nur soldato Ŝvejĥ
Ukázky z díla známého českého humoristy J. Haška v překladech S. Kamarýta, O. Kníchala, M. Lukáše, M. Malovce, J. Patery a V. Váni.

SLOVNÍKY:

C 080 = 8.00
Kilian: 808 nejužívanějších slovních kmenů v mezinárodním jazyce esperanto

C 053 =
Kilian: Esperantsko-český a česko-esperantský slovníček

C 074 = 20.00
Hromada: Esperantsko-český a česko-esperantský kapesní slovníček

C 077 = 70.00
Bří Filipové: Velký slovník česko-esperantský

(Odborné slovníky jsou uvedeny v oddílu "Odborné knihy")

UČEBNICE A PŘÍRUČKY KE ZKOUŠKÁM

C 025 = 14.00
Prachař: Esperanto 1
Učebnice pro děti věkově asi pro 3.tř. ZŠ. K učebnici patří soubor volných pracovních listů pro vypracovávání úloh.

C 026 = 24.50
Prachař: Esperanto 2
Učebnice navazující na předchozí 1. díl, je také stejným způsobem zpracována. Věkově pro děti 4. až 5. tř. ZŠ. Obě Prachařovy učebnice však s oblibou používají někteří dospělí!

- C 052 = 8.00
 Kilian: ABC mezinárodního jazyka esperanta
Stručná učebnice esperanta, používaná např. v Letním esperantském táboře v Lančově na Vranovské přehradě.
- C 051 = 24.00
 Cink: Cvičebnice esperanta pro pokročilé
Tato učebnice je používána i v písemných kurzech esperanta pro pokročilé, které pořádá ĈES.
- C 014 = 10.00
 Vondroušek: Historie a spisovatelé
Stručný nástin dějin mezinárodních jazyků, esperantského hnutí, písemnictví a literatury v esperantu. (Ĉesky)
- C 014/a = 10.00
 Vondroušek: Historio kaj biografioj
Obdoba předchozí knížky v esperantu.
- C 081 = 10.00
 Kilian: La Mondo Rakontas
50 povídek z 5 světdílů - malá čítanka pro mírně pokročilé.
- C 012 = 20.00
 Kamarýt: Historio de la Esperantomovado en Ĉeĥoslovakio
Dějiny čs. esperantského hnutí od jeho začátků v 19. stol. až po jeho potlačení v padesátých letech 20. století. Výborné a ojedinělé dílo za cenu nižší než nízkou!
- LS 004 = 17.00
 Malovec: Gramatiko de Esperanto
Dosud nejpodrobnější přehled esperantské mluvnice, který u nás dosud vyšel.
- LS 005 = 35.00
 Barandovská: Esperanto pro samouky
Učebnice vydaná SPN v edici podobných učebnic dalších jazyků. Jedná se vlastně o dvě učebnice v jednom svazku, protože
- posledních deset dvojlekcí je určeno pro pokročilé.*
- Povídky, romány a jiná próza**
- C 001 = 4.00
 Rumler: Abunde kaj redunde
Esej o různých stylech v mezinárodním jazyce. Plus synonymický slovníček Pražské literární školy.
Eseo pri diversaj stiloj en la Internacia Lingvo. Plus sinonima glosaro de Praga artiliteratura skolo.
- C 002 = 4.00
 Nezval: El mia vivo - Vzpomínky českého básníka na mládí s ukázkou komedie „Schovávaná na schodech“, přel. J. Vondroušek
- C 004 = 8.00
 Vondroušek: Ĝojoj de mia vivo
5 českých pověstí od A. Jiráska, 5 ukázek z díla K. Čapka a 1 od J. Šmída, přeložených J. Vondrouškem
- C 007 = 5.00
 K. Čapek: Antologieto el lia verkaro (J. Vondroušek) kun konciza priskribo de lia signifo, biografio kaj bibliografio.
- C 010 = 8.00
 Dyk: Ondro kaj Drako
Divadelní hra v překladu J. Vondrouška.
- C 021 = 10.00
 G. Bradatsch: Ĉiam malnova kaj ĉiam nova - Zajímavé seznámení s Prahou a její historie z pera německé autorky, v překladu M. Ludewig-ové.
- C 022 = 10.00
 Meze de Eŭropo. Skizo pri la historio de Ĉeĥoslovakio.
- C 005 = 16.00
 Vinař: La skandalo pro Jozefo
Apokryficky zpracovaný příběh o biblic-

kém Josefovi a Potifarově manželce.

C 092 = 13.00

Echtner: Sep tradukoj - *Esperantské překlady V. Echnera pro knihu „Češoslovaka antologio“.* Ukázky z děl A. Jiráska, J. Zeyera, F. Šrámka, H. Malířové, A. M. Tilschové, J. Š. Baara a J. Vrby.

K 204 = 18.00

Setälä: Taglibro de kongresano - *Turisma parologilo por nova esperantisto.*

C 208 = 26.00

Almanako Lorenz 1991

C 208 = 26.00

Almanako Lorenz 1993

Výběr článků a studií z různých oborů.

C 160 = 9.00

Móricz: Malričaj homoj
Román popisující dovolenou vojáka, který během válečných jatek v zákopech ztratil úctu k lidskému životu.

"5" = 10.00

Jókai: La Filoj de l' Ŝtonkora Homo
Román převedený do formy obrázkového seriálu.

C 035 = 19.00

Szalazakowa: Janusz Korczak
O životě a díle a odkazu velkého polského lékaře humanisty.

C 036 = 12.00

Z. Nalkowska: Medailonoj

K 272 = 35.00

Bauer: La fenomeno Svislando
Studie o Švýcarské federaci.

C 173 = 28.00

Tvarozek: Anekdotoj pri famaj homoj
Krátké historky ze života slavných lidí.

C 182 = 26.00

Kožík: Lumo en tenebroj. Dolorplena kaj heroa vivo de J.A.Komenský)
Kožíkovo dílo o J.A.Komenském doplněné o části "El la saĝo de Komenio" a "Labirinto de la mondo kaj paradizo de la koro".

C 140 = 20.00

Lejzerowicz: El la "Verda Biblio"
Na způsob Bible vyprávěné hlavní události historie esp. hnutí.

C 200 = 30.00

S. Štimec: Vojaĝo al Disiĝo

Antologie

C 037 = 8.00

Estona soveta poezio

C 123 = 10.00

Almanako de Bulgaraj Esperantistoj

Básně

C 003 = 16.00

Eli Urbanová: El subaj fontoj
V pořadí druhá sbírka známé a úspěšné básničky dávající nahlédnout do intimního světa ženské duše.

C 009 = 4.00

Karen (Košíněk) - Rumler - Urbanová - Vidman: Kvarfolio - *Výběr z veršů pražských básníků -esperantistů.*

C 011 = 4.00

P. Bezruč: Sileziaj kantoj

C 032 = 5.00

Košíněk: Elekto el la originalaj kaj tradukitaj poemoj
Připojen životopis J. Kořínka od V. Novobilského a stručné údaje o básnících, jejichž básně jsou zde v překladu uvedeny.

C 062 = 8.00
 D.Vaarandi: Ventolume
Výbor z díla současné estonské básničky

C 083 = 4.00
 Rumler: 52 současní čeští básníci v 1000 verších - 52 nuntempaj ĉeĥaj poetoj en 1000 versoj - *Dvojazyčný výběr básní s překlady J. Rumlera*

K 221 = 18.00
 J.Liiv: AL abelujo ĝi flugas
Úspěšná sbírka přírodní a intimní lyriky v překladu od H. Dresenové

K 254 = 4.00
 Lorenz: Vočoj de poetoj el la spirita mondo - *Sbírka básní od slavných esperantských básníků, které měli napsat po své smrti prostřednictvím F. V. Lorenze, který působil jako médium.*

C 126 = 7.00
 Gorov: Ribela Kordo

Zpěvníky

C 084 = 16.00
 Bří Filipové: Kantareto. Ĉeĥoslovakaj popolaj kantoj, esperantigitaj - *Připojeny překlady státní hymny „Ho kie hejm“, „Super Tatra fulmas“, chorálu „Sankta Vencesla“ a esperantské hymny „La Espero“. K textům uvedeny i noty.*

C 162 = 24.00
 Cink: Societa Kantareto
Zpěvník vydaný k příležitosti 43. kongresu IFEF v Olomouci 1991. Nově zařazena Železničářská píseň. Uvedeny nejúspěšnější písničky z předchozích zpěvníků J. Cinka

Odborné knihy

(věda, technika)

C 016 = 10.00
 Kolekto de la referaĵoj el la internacia seminario „Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko 1982“.
Temata přednášek: Energie - celosvětový problém. Odborný jazyk a terminologie.

C 089 = 45.00
 Kolekto de la referaĵoj el la internacia seminario „Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehnika 1989“.
Téma přednášek: Doprava.

C 095 = 39.00
 Werner: Matematika Vortaro Esperanta-Ĉeĥa-Germana

C 019 = 20.00
 Werner: Terminologia Kurso
Jediná u nás přístupná příručka pro terminologickou práci esperantu

C 020 = 16.00
 Rybář: Terminaro de Hidraŭlaj Meĥanismoj - *Systematicky řazený terminář hydraulických mechanismů, k definicím v esperantu, přiřazeny výrazy anglické, české, francouzské, německé a ruské.*

C 203 = 288.00
 Rybář: Terminaro de Hidraŭlaj Meĥanismoj. Terminaro de la Terminologia Esperanto-Centro - *Předchozí terminář (C 020) doplněný disketou*

C 018 = 19.00
 Hradil: Esperanta Medicina Terminaro
Lékařský terminář, jednojazyčný, oficializovaný UMEA (Světovým esperantským lékařským svazem)

C 027 = 43.00
 Traxler: Ĉesko-esper. právnícký slovník

- C 079 = 49.00
Traxler: Esper.-český právnícký slovník
- C 013 = 9.00
Túma: La fundamentaj konsideroj de la scineco pri la varmo - *Kurz termodinamiky s četnými grafy a matematickým aparátem na nezbytné úrovni*
- C 209 = 16.00
Internacia Seminario pri Komenio, Prago 1992. *Sborník přednášek*
- C 015 = 30.00
Zborník materiálův z interlingvistického seminára „Problémy interlingvistiky“ (1987). *Sborník přednášek ve slovenském a českém jazyce, se shrnutím v esperantu*
- C 137 = 25.00
Geologio Internacia, vol. 5, 1984
5. číslo mezinárodního geologického sborníku (periodického) v esperantu
- C 055 = 3.00
Bednarz: Bibliografio de la Esperanto-eldonaĵoj aperigitaj en Pollando 1945-1979
- C 108 = 7.00
Internacia Komputado '84: Retoj
- C 129 = 24.00
Szilvási: Radioteknika Artikolaro 1984
Připojen slovníček esperantsko-anglicko-maďarsko-ruský
- C 201 = 288.00
Stomatologia terminaro - *Stomatologický terminář TEC se softwarem*
- C 204 = 165.00
Aplikační program „Termino 1 + Runtime“
- C 205 = 50.00
Demonstrační disketa programového vybavení pro mnohojazyčné kódové pro-
- středí dle ISO 6937
- C 206 = 65.00
Mezinárodní ISO-kódy „Názvy zemí apod.“
- “tec” = 1650.00
Multi Alphabet 2 čís. 92510
- “tec” = 1650.00
Multi Alphabet 2 čís. 92512 (disketa 3,25")
- Sport**
- C 029 = 10.00
Novák-Špička: Konvero
- C 030 = 15.00
Novák-Špička-Hnik:
La transdorsjeto
- Odnznaky**
- A 001 = 4.50
Esperantská hvězdička v bílém poli, φ 7 mm
- A 002 = 5.00
Esperantská hvězdička v bílé kruhové výseči, pod ní v oblouku nápis „Esperanto“, 10 x 17 mm
- A 002 = 5.00
Odnznak esperantských rybářů IFEK (8 barev)
- A 002 = 5.00
Odnznak esperantských zdravotníků
- A 002 = 5.00
Odnznak esperantských veteránů
- A 002 = 5.00
Odnznak KKEI (zákl. barva červená nebo bílá)
- A 003 = 6.00
Odnznak SET Lančov (5 barev)
- A 003 = 6.00
Odnznak EK Třebíč (3 barvy)
- A 004 = 14.00
Odnznak esperantských mineralogů

A 005 = 10.00
Odnak Ĉeského esperantkého svazu
 A 006 = 17.00
Odnak „Mi amas Esperanton“, kotouč 37 mm, zavírací špendlík

Samolepky

B 008 = 5.00
Mondpaca Esperantista Movado (kruh φ 35 mm, 9 samolepek na fólii)
 B 010 = 0.60
Holubice míru (kruh φ 35 mm, jednotlivě)
 B 011 = 0.60
Zeměkoule (kruh φ 35 mm, jednotlivě)
 B 012 = 7.00
100 jaroj de Esperanto (obdélník na výšku 29x38 mm, 15 ks na fólii)
 B 016 = 5.00
Esperanto Lingvo Internacia (kruh φ 64 mm, 4 ks na fólii)
 B 021 = 2.00
Esperanto Vás spojí se světem (obdélník na šířku, 32 x 16 mm, 28 samolepek na fólii)
 B 027 = 2.00
Internacia Lingvo Esperanto (obdélník zelený, 38 x 19 mm, 24 ks na fólii)
 B 027/b = 2.00
Esperanto-ponto inter nacioj (obdélník zelený, 38 x 19 mm, 24 ks na fólii)
 B 028 = 9.00
43-a kongreso de IFEF Olomouc 1991 (45 x 45 mm, 6 ks na fólii)

Ostatní zboží

B 006 = 2.50
Taška umělohmotná "Klíč"
 B 015 = 35.00
Plastika "Zamenhof"
 B 019 = 14.00
Pouzdro k medaili (B 020)
 B 020 = 130.00
Medaile ke 100. výročí esperanta

B 026 = 58.00
Kazeta "TEAM"

Lingvoservo dále nabízí mimo zboží uvedené v nabídkovém seznamu na rok 1995 také tyto knížky, které má na skladě pouze v omezeném množství:

LS 005 = 147,- Kč
La Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto
Prelegokolekto de la unua simpozio de la Akademio de Esperanto, kiu okazis en Prago 1994
 LS 006 = 142,- Kč
Lingvo kaj Kibernetiko - Selektio de la prelegoj pri lingvo kaj kibernetiko de la 6-a TAKIS-kongreso INTERKIBERNETIK '93 en Iași (Rumanio)
 LS 007 = 21,-Kč
J.Kavka: Ĉu leŭcito en Bohemio? Geologia studaĵo de la konata geologo-esperantisto

Těšíme se na Vaše objednávky na výše uvedené adrese.



Vážení čtenáři Starta

Na začátku roku 1995 rozhodla rada Českého esperantského svazu, že první čísla Starta ročníku 1995 budou zaslána všem esperantistům, kteří jsou uvedeni ve svazovém adresáři bez ohledu na to, zda zaplatili své členské příspěvky nebo ne. Bylo to míněno také jako gesto vůči všem členům Svazu, těm nynějším i bývalým, jimž jsme chtěli umožnit obnovit své členství ve Svazu v období před Světovým esperantským kongresem v Praze 1996. Současně Svaz podnikl kroky k zavedení pořádku do členské evidence. Proto byl všem členům poštou rozeslán kartoteční lístek s prosbou o jeho vyplnění tak, aby mohl být aktualizován adresář členů Svazu. Období, pro něž byla přijata tato mimořádná opatření, již končí. Pokud jste své členské příspěvky pro rok 1995 ještě neuhradili a pokud jste doposud neodeslali na adresu Svazu vyplněný kartoteční lístek, učinite tak obratem. V opačném případě Vám nemůžeme garantovat, že budete dostávat Starto jako doposud.

Květa Hubnová

Příspěvkový řád:

- A - alespoň 120,- Kč - výdělečně činní
 B - alespoň 60,- Kč - důchodci, studenti, vojáci základní služby, ženy v domácnosti, invalidé, nezaměstnaní
 C - alespoň 300,- Kč - podporující esperanto (mecenáši, sponzoři)
 D - alespoň 30,- Kč - rodinní příslušníci (další členové domácnosti, kde už jeden odebírá Starto za plné členství)
 E - alespoň 30,- Kč příznivci esperanta (děti a ti, kteří neumějí esperanto, ale hlásí se k myšlence dorozumění; nedostávají Starto)
 F - alespoň 2.400,- Kč - doživotní členové
 G - alespoň 90,- Kč - příznivci esperanta dostávající Starto
 Zahraněční členové - 20,- ECU ♦ Zápisné - 20,- Kč (při vstupu do Svazu)

Kartoteční lístek ČES

Příjmení: _____ Jméno: _____
 Titul: _____ Rodné číslo: _____
 Adresa: _____
 Telefon: _____ Fax: _____
 Povolání: _____ Člen kroužku: _____
 Člen ČES od: _____ Číslo legitimace: _____

Člen nebo zájemce o členství v sekcích ČES (zatrhněte):

děti (do 15 let)
 křesťanů (KELI)
 pedagogické (ILEI)
 šachové (EŠLI)

mládeže (do 30 let)
 mineralogů
 přátel SAT (SAT)
 vědecko-technické (ISAE)

esp. veteránů (VEK)
 nevidomých (LIBE)
 sběratelů esp. tematiky
 zdravotnické (UMEA)

katolíků (IKUE)
 ochránců přírody
 skautské (SEL)
 železničářské (IFEF)

Datum: _____

Podpis: _____

**Český esperantský svaz
ESPERANTO, p. s. 1069
111 21 Praha 1**

☆ STARTO ☆

Periodikum Českého esperantského svazu

**Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno
Členská evidence a změny adres: Květa Hubnová, ČES Praha**

Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 15 gld

**Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15, 625 00 Brno
Ĉeĥa Respubliko**

**Podávání novinových zásilek povoleno
JmŘS Brno, č. j. P/3-8847/91 ze dne 28. 8. 1991**

NOVINOVÁ ZÁSILKA

**Poštovné hrazeno v hotovosti u pošty
664 03 Podolí u Brna**

Variabilní symboly pro platby Českému esperantskému svazu

694	členské příspěvky ČES
694.1	členské příspěvky UEA
694.3	dary členů
604.2	písemné kurzy
604.3	předplatné Starto (48 Kč v tuzemsku, 120 Kč pro zahraničí, UEA 15 NLG)
604.31	předplatné Sano
604.32	předplatné Juna Amiko (Hasala)
604.4	předplatné Heroldo de Esperanto
325.6	inzerce v Heroldo de Esperanto
604.5	předplatné Internacia Fervojisto (Piŝtora)
789.1	sekce mládeže
789.3	sekce železničářů
789.4	předplatné Dia Regno (Polnický)
789.5	vědeckotechnická sekce (Pospíšil)
789.7	sekce pedagogů
789.71	členské příspěvky ILEI včetně Internacia Pedagogia Revuo (celkem 100 Kč - Malovec)
789.10	sekce šachistů (Štěpánek)
789.11	sekce sběratelů
789.13	Scienco Revuo
789.15	ediční fond, Ringo
789.17	sekce nevidomých
668.1	dividendy
682	tržby z prodeje cenných papírů a vkladů
311	expedice, úhrada koupených knih a materiálu

Účel platby doporučujeme napsat i dozadu na poštovní poukázku na místo vyhrazené pro "Zprávy pro příjemce".

EVENTOJ denove aboneblaj

Interesatoj pri la plej ofta Esperanto-periodaĵo EVENTOJ skribu al la nova peranto Vladislav Hasala, poŝtkesto 34, 696 62 Strážnice, tel. 0631/942 507 aŭ 0631/2079.

La abonkotizo por 1995 estas 570,- Kč.

Informoj el la komitato de ĈEA

Al la aprila kunsido estis la komitato invitita en Trutnov, kie ĝi traktis la 29-an de aprilo. El la traktitaj programaj punktoj mi anoncu: Finfine solviĝis la posteno de la UEA-ĉefdelegito por Ĉeĥa respubliko. La estraro de UEA akceptis nian proponon kaj tial la funkcion transprenas samideanino Stanislava Chrdlová (adreso: Anglická 878, 252 29 Dobříchovice). Ĉe tiu okazo mi sentas mian devon danki al Linhart Rýznar el Svitavy, kiu multajn jarojn - ĉefe en la tempo, kiam ĉiu oficiala respondeculo de „okcidenteŭropa“ komunumo havis daŭrajn problemojn fare de komunismaj ŝtatorganoj - plenumis tre ofereme kaj bonege kaj tiun ĉi pretendan funkcion.

La komitato ankaŭ akceptis retiriĝon de samideano Adolf Staňura el Havířov el la gvidado de la lingva komisiono de ĈEA. La kaŭzo estas lia aĝo kaj sanstato. Ankaŭ al tiu honora membro de ĈEA la komitato esprimis dankon por farita laboro, kiu ofte ne estis tro videbla sed grave helpis al bona lingvaĵo de multaj asociaj eldonaĵoj. Lige kun tio la komitato decidis ne plu havi oficialan lingvan komisionon, ĉar la malpli viglan eldonagadon en nunaj cirkonstancoj kapablas lingve memstaraj fakuloj inter niaj membroj (M. Malovec, J. Vondroušek, K. Kraft kaj aliaj).

Grava parto de la komitata programo estis dediĉita al UK en Prago 1996. Estis kompletigita LLK, oni diskutis proponojn de la kongresa emblemo kaj pri kelkaj aliaj organizaj paŝoj. Oni preparolis ankaŭ aligitajn programerojn al UK - nome la antaŭ kaj postkongreson. La atenton en

diskutoj kaptis ankaŭ karavano al UK en Tampere kaj la stato de preparoj de IKUE-kongreso en Olomouc.

Al la plej gravaj punktoj de la programo apartenis debato dediĉita al la asocia membraro. Oni taksis rezultojn de aktualigo de membro-sliparo, kiu ĝuste finiĝis, diskutis pri pensmaniero de adresaro por dissendado de Starto kaj plujaj demandoj, kiuj ligiĝas al niaj membroj. Kompreneble, ke en la programo ne povis manki detalaj informoj pri aktuala stato de asocia mastrumado kaj pri nia rilato al UEA (membrostatistiko k.s.). La komitata menuo krome havis plurajn erojn, pri kiuj estas necese daŭre informiĝi.

La komitato traktis en bona agordo kaj la komitatanoj senproteste akceptis novajn taskojn kun plena respondeco.

V. Kočvara, prezidanto



Japania vizito

Kunvenon de la Esperanto-klubo en Olomouc la 21. 3. 1995 vizitis japana ĵurnalistino s-anino Kazuko Kikushima, kiu venis en nian landon je invito de la Unio de nevidantoj, ĉar ŝi studas vivkondiĉojn de ĉi tiuj civitanoj en diversaj eŭropaj landoj. Venontan tagon ŝi trarigardis memorindaĵojn de la urbo Olomouc. Ŝian intereson vekis ankaŭ la ekspozicio „Mondo de teo“ en la Regiona Muzeo. Vespere ŝi forveturis en la urbon Pĥerov. Ŝi partoprenis tie kunvenon de la loka Esperanto-klubo, kie ŝi prelegis pri sia vojaĝado en Mongolio.

V. Mohapl

Esperanto en teatra festivalo

En du ĉelimaj urboj - la ĉeĥa Ĉeský Těšín kaj la pola Cieszyn - okazis jam sesfoje la internacia teatra festivalo. En ĝi partoprenis diversaj teatroj prezentantaj dramverkojn en la ĉeĥa, pola kaj slovaka lingvoj. Ĉijare en maja semajna programo oni enprogramigis unuafoje teatraĵojn en Esperanto. La 10-an de majo prezentiĝis en la kamera salono de la kultura domo „Dom narodowy” en Cieszyn J. Gibczynska el Krakovo, kiu ludis monodramon pri la vivo de Zamenhof kiel lin vidis lia patrino, edzino kaj filino. Inter kvindeko da spektantoj estis krom Poloj ankaŭ Ĉeĥoj kaj ankaŭ hazarda gasto el Aŭstralio.

Oficiala akcepto de Esperanto fare de organiza festivala komitato estas grava sukceso atingita danke al iniciato de loka esperantistaro, ĉefe nia amiko inĝ. Glajcar. Pri la prezento informis ankaŭ ĉeĥa gazetaro.

V. Kočvara

Kiel vi uzas Esperanton en la praktiko?

Nia E-societo nomiĝas „Praktika Linio” kaj estas - laŭ niaj esperoj - linio senfina, al kiu rajtas aliĝi ĉiu ajn, kiu parolas la Internacian Lingvon almenaŭ en konversacia nivelo kaj uzas ĝin en la praktiko.

Via aliĝo al la Praktika Linio havas unu kondiĉon: sendu al nia adreso ĉiam ĝis la 31-a de majo en ĉiu jaro en longeco de 1 linio ĝis 1 paĝo informon, kiel vi uzis Esperanton en la pasinta jaro, kiel vi aplikis ĝin en la praktiko, ĉu vi faris ekzamenojn k.t.p. Kompense vi ricevos de

ni la alvenintajn adresojn.

En 1996 ni intencas eldoni libron „Kiel mi profitas Esperanton?” Nun ni kolektas ideojn, pensojn kaj manuskriptojn. Bonvolu al ni skribi, kiel vi profitis Esperanton ĝis nun kaj kiajn rezultojn vi atingis.

Jozefo Baksa,
pk 263, 8901 Zalaegerszeg, Hungario

Operlingvo?

En la teatro Archa (Na Poříčí 26, Praha 1) mi ĝuis prezenton de Opera La Serra (15. 2. 1995, 20.00).

La ĉeĥaj aŭtoroj, *Michal Vích* (muziko) kaj *Jaroslav Dušek* (libreto) estis gvidataj de l' ideo, ke operŝatanton interesas ĉefe la muziko, ĥoreografio kaj scenejo, dum la kantataj tekstoj restas plejparte nekomprenataj, do neglektataj. Tiu ĉi cirkonstanco sugestis al ili elpenson de operlingvo, trafe nomita „operanto”. Ĝin komprenas nek la spektantoj, nek la kantantoj, nek la tekst-aŭtoro mem. Tamen ĝi bone taŭgas por esprimi ĉion, kio estas okazanta sur la scenejo. Jen kelkaj ekzemploj:

1. komencaj vortoj de l' amdueto:
Sita sitavá, diŭna prekolá...
2. komenciĝas la minac-averto:
Ahra bahrá...
3. la baldanco: *Oň gola maradžina...*
4. ploras la fraŭlo: *Ju hu, jŭ hŭ ...*
5. la decida batalo:
Sykota rejta zumra mruskata...

Jen originala lingva komunikilo, kies nomo iom suspekte similas al Esperanto, ĉu ne?

J. Kavka

El Praga PEN-Kongreso

Perla Ari Martinelli, ĉefredaktorino de Literatura Foiro (Svisl.) kaj Giorgio Silfer, direktoro de LF-Kooperativo raportas en LF (153, febr. 1995) pri la mondkongreso de PEN-Klubo Internacia en Prago, 1994. Ŝi substrekas en artikolo „Kaj la Dnjestro ruladas sin plu“, ke „la kongreso rezervis al la Esperanta PEN gravajn sukcesojn.“ Temas pri stato de etnaj minoritatoj (hungara en Rumanio kaj rumana en Dnjestrio). La esperantisto devis fari geopolitikan klarigon pri Dnjestrio, ŝajne konata al neniuj okcidentano. - En aprobo de du rezolucioj aktivis Silfer kaj poste en asemblea baloto „la voĉo de nia delegito estis decida“.

Tio ĉi montras la prestiĝon de la Esperanta PEN kaj rapidan integriĝon en la tuta PEN-Klubo, kio kaŭzis poste oficialan inviton (kvankam ĝi estas registrita en okcidenta Eŭropo) al la konferenco de la orienteŭropaj PEN-centroj en Rumanio, septembron 1995. La efektiva vivo de la Esperanta Centro rolas en plivalorigo de Esperanto „ĉe la verkistara UNO“. Nia Centro estis oficiale listigita inter la membroj de la Pac-Komitato. Laŭ reprezentantino de Unesko, la PEN-Klubo Internacia estas nun la plej prestiĝa el la neregistaraj organizoj de Unesko. (Ni scias krome, ke ankaŭ UEA havas konsultan postenon ĉe Unesko).

J. Mařík

Giorgio Silfer pri bela Prago kaj surpriza Havel

En artikolo „Lingvoj adaptiĝas ...“ de G. Silfer, direktoro de LF-Kooperativo (Svislando), mi elpikas pri la praga kongreso de PEN-Klubo Internacia, 1994.

„Kiel fartas Esperanto-verkisto en Prago?“ Li respondas: „Sufiĉe bone kaj tre okupite“. En la kongreso Silfer kontaktis nur unu „samlingvanon“ (esperantiston), kiu ĉestis kaj estas la plej grava privata eldonisto en Ĉeĥio. (Kiu alia - laŭ mi - ol Ivo Železný? Cetere aperos intervjuo kun li.)

La urbo Prago laŭ Silfer: urbo arte kaj historie riĉa, kiel Florenco (sed jam ne kiel Romo aŭ Venecio), ĝi estas unu el la plej belaj urboj en Eŭropo. Samtempe ĝi aspektas iel ekster Eŭropo, preskaŭ nedifinebla, kiel la aĝo de la fantomoj kiuj vivas en la legendoj de multaj strat-anguloj. Mi perceptis Pragon urbo kun duobla personeco: foje mi sentis min en okcidento, sed ofte multe pli oriente ol, ekzemple, Budapeŝto. Kiam mi ne konis Pragon, mi rakontigis ĝin al mi, de vizitintoj. Rezultis el tio la unuaj versoj de ne eldonita poemo: *Trista kaj verve juna (kiel la printemp' en Prago...)*! Nu, mi vizitis la urbon aŭtune, sed mi eksentis tion, kio povus esti la doloro de la printempo. Sed ĉu sprosoj „doloras“? kiel mampintoj de pubera brusto?

La kongreso mem estis pli trafa en la surprizoj ol en la atendoj. Elreviĝo estis la parolado de Václav Havel: kiu ajn „negro“ de duaranga kulturministro kapablus je tio. Nu, Prago 1994 ne estas Parizo 1848 ... -- Ankoraŭ pli ol en Santiago (en la antaŭa kongreso) mi sentis ke nia lingvo estas akceptata kiel arta perilo, kaj eĉ kreskas la interesiĝo pri nia literaturo: en venonta PEN-kongreso necesos kontentigi ĉi tiun deziron. ---

(El kromnoto ni sciiĝas, ke la altajn aliĝkotizon kaj veturkostojn pagas la delegitoj el sia poŝo kaj 65-7501-8 Svislando - Antaŭdankon! ...)

J. Mařík

9000 periodaĵoj en Esperanto (?!)

Jablonné nad Orlicí estas negranda vilaĝo (2 000 loĝ.) en la orienta Bohemio. Tie, ĉe esperantista eldonisto Antonín Pražák, aperis en 1934 verko ĝis tiam unika: tutmonda Katalogo de la Esperanto-Gazetaro, komplita de József Takács, konata madjara aktivulo. La kolekto enhavas ankaŭ titolojn de nacilingvaj gazetoj kun E-rubriko kaj de gazetoj de diversaj „mondlingvoj“.

Tiu verko post la 60 jaroj estas jam longe neaktuala. Alia madjaro, d-ro Árpád Máthé, post longa kaj pretendo-plena laboro, en kunlaboro de ge-hispanoj L. Fl. Yzal kaj A. M. Urgellés, preparis novan aktualan eldonon. La provokzemplero, publikigita en n-roj decembro 1993 ĝis decembro 1994 de „PERIODAĴOJ“, organo de Rondo Takács, enhavas ĉirkaŭ 5.000 titolojn (kun, se konate, eldonjaroj kaj lokoj.)

Komisiita revizii kaj kompletigi la kolekton per indikoj pri E-periodaĵoj precipe en la ĉeĥa kaj slovakaj teritorioj, mi faris vere temporaban kaj okul-pretendan laboron kaj elskribis la koncernajn periodaĵojn aperintajn en niaj teritorioj. Ilia nombro estas surpriza: 336 titoloj, inkluzive de bultenoj de germanlingvaj esperantistoj nialande. Kompreneble, inter ili estas ĉio, ankaŭ kun vivolongo efemera, bultenoj, informiloj. Krom tiuj elskriboj mi kompilis liston de kompletigoj ĝis la stato en 1994/95/ pri periodaĵoj - mankantaj ĉe Máthé: 15 titoloj. El mia postrestinta arĥivo (ĉ. 90 kg da revuoj mi estas donacinta al la Muzeo en Ĉ. Třebová) mi aldonis ankaŭ 13 titolojn de alilandaj gazetoj mankantaj ĉe Máthé (ekz. eĉ el Borneo).

Tuj periodaĵoj certe estas nekonataj

al niatempuloj: Kata Gazeto (Hradec Králové, 1967-69), Internacia Gazetara Sporta Servo en Aussig/Ústí n. L., Ĉeĥa PEK-bulteno („ie en Ĉeĥio“), Esperantský svět - („ie en Ĉeĥio“).

En mia kompletigo de donitaĵoj estas ankaŭ monda unikaĵo: ĉiutaga kurso de E., kun 60 lecionoj, de geedzoj Chrdle, en nia EXPRES (Praha, 1991). La plej eta presita bulteno en mia kolekto estas „Esperanto Lega Rondo“ (Germ., 1917, 18x11 cm), la plej granda estas la „giganta“ „La Gazeto“ (Fr., 49x32 cm).

Krom la trovo de novaj 28 titoloj mi precizigis en la listego de Rondo Takács indikojn ĉe 73 titoloj. - Por la fino de 1995 la Rondo planas eldoni ĝisdatan liston de ĉ. 9 000 titoloj (!).

Nin povas interesi, ke d-ro Máthé persone ĉerpis ankaŭ el la biblioteko de EK Praha, dum kelkhora restado. La ne elĉerpitajn informojn oni nun devus serĉi en la Muzeo en Česká Třebová, kien la biblioteko estis forlokita.

J. Mařík



Unuaj provoj pri UK en Ĉeĥio

En 1996 estas okazonta en Praha la 81-a Universala Kongreso de Esperanto. Interesas ekscii, ke jam en j. 1909 la magistrato de Prago sendis sian oficialan delegiton, konsiliston Biskup, kiu estis membro de la Bohema Asocio Esperantista, al la Universala Kongreso en Barcelono kun la celo inviti la UK por la j. 1912 en Pragon. Same faris Asocio por fremdultrafiko.

Tamen fine, la UK en 1912 okazis en Krakovo, unu el la tri proponitaj urboj, el kiuj la tria estis Graz. (Interese, ke la urbo

Vieno malpermesis inviti la UK en Vienon). Nur en 1921 efektiviĝis la espero de la urbo Prago: okazis tie la 13-a UK (Slava insulo).

Por 1992 estis planita UK por Prago, sed pro malhelpoj ne okazis. Fine, venontjare okazos en Prago la 81-a UK. UEA jam aprobis la Lokan kongresan komitaton. La centro de Eŭropo certe altiros multajn kongresanojn.

Ni kondolencas

Ni kondolencas al la Esperanto-klubo en Olomouc, kies membro, inĝ. František Svoboda forpasis la 9-an de majo en sia 57-a jaro. En kelkaj lastaj jaroj li motoris kelkajn gravajn eventojn de nia movado en Olomouc. Mi menciis almenaŭ la 5-an kongreson de ĈEA en 1987 kaj la 43-an kongreson de IFEF en 1991. En li perdas Ĉeĥa Esperanto-Asocio entuziasman kaj laboreman membron.

V.Kočvara



Mgr. Zdeněk Hršel

Je „to“ vĝdy „tio“?

Jazyková poznámka

Ĉtenář namítne: „Proč ten otazník? Vĝdy ti tak stojí ve všech slovnících a učebnicích.“ To je možné. Ale slovník od Kühnla a Procházky (1914) uvádí také „kdo je to? - kiu ĝi estas?“ a slovník bratří Filipů (1949) m. j. „co je to? - kio estas tio? kio ĝi estas?“ a „kdo je to? - kiu li/ŝi estas?“.

Co o zájmenech „tio“ a „ĝi“ říká největší esperantský slovník, Plena Ilustrita Vortaro (PIV)? U hesla „tio“ uvádí m. j. tyto příklady: tio estas tre facila; kion tio

signifas?; ĉu tio estas vi, Ivan?; tio, kion vi diras, estas tre grava; mi volis atentigi vin pri tio, ke en nia afero ĉio povas esti atingita nur per harmonio kaj konstanteco. Když uvedené příklady vyjádříme česky, ekvivalentní „to“ bude vĝdy přízvučné.

U hesla „ĝi“ uvádí PIV tyto příklady: la tranĉilo tranĉas bone, ĉar ĝi estas akra; la infano ploras, ĉar ĝi volas manĝi; ĉu ĝi estas vi? jes, ĝi estas mi; ĉu ĝi estas ebla, ke ... Když tyto příklady vyjádříme česky, pak u prvních dvou příslušná zájmena zamlčíme (nuž - on, dítě - ono), avšak u třetího - jsi to ty? ano, jsem to já - užijeme ukazovací zájmeno „to“, avšak bez přízvuku. A teď si už můžeme stanovit jednoduché a praktické pravidlo, které se - pokud vím - nevyskytuje v žádné naší učebnici esperanta. **České ukazovací zájmeno „to“**, pokud je na něm ve větě přízvučné, odpovídá esperantskému „tio“; **neni-li na něm přízvučné**, odpovídá esperantskému osobnímu zájmenu „ĝi“. Doložme si to na příkladech.

Jak je to snadné! - *Kiel facila ĝi estas?*
Zajímá tě to vůbec? - *Ĉu ĝi interesas vin?*
Řekneš mi to konečně? - *Ĉu vi fine diros ĝin al mi?*

Už je to uděláno. - *Ĝi estas jam farita.*

Všimněme si, že nepřízvučné „to“ v 1. pádě stojí za časovým slovesem.

„To“ však může být i částice, jednak citová, zdůrazňovací, např. „to (ale) přší!“, „co to neseš?“, „to se mu to jde!“ - „To nepřijdeš domů?“ Že tu v esperantu nebude „tio“, je jasné. Jak je vyjádřit esperantsky, dáváme za dobrovolný úkol vám, milí čtenáři. Odpovídající řešení otiskneme se jménem původce.

Ĝis relego!

DEMOKRATIA UNIO PRI ESPERANTO

Dum la kunveno de la Demokratia Unio en Ostrava en la klubo Alfa 30. 5. 1995 je la 19-a horo estis metita jena demando: „Kiel vi konsideras la internacian lingvon Esperanto, kia estas rilato de la Demokratia Unio al la lingvo?” Respondis la prezidantino de la Demokratia Unio inĝ. Alena Hromádková: „Nia rilato al Esperanto estas tre pozitiva. Mi mem Esperanton ellernis, akiris amikojn. Helpe de Esperanto estis eble en la pasintaj jaroj ligi kontaktojn, ekscii interesajn, kiam alimaniere tio ne eblis. Esperanto estas tre bona rimedo por interkompreniĝo.

(V. Sládeček)

Bernard Golden:

ETIMOLOGIO

La veneno de la ezoko kaj la deveno de la bakfiŝo

Moto:

Putrado de fiŝo komenciĝas de l' kapo

Etimologia diletanteco

Jan Werner ĉe la fino de sia artikolo pri terminografio (*Starto* 4/1992 [151], 4-6) konkludis, ke ĝis nun esperantistoj laborantaj sur la faklingva tereno diletas (1), tio estas ili agas neprofesie. Oni ja povas trovi ankaŭ aliajn lingvoterenojn, kie malfakuloj agadas amatorece kaj produktas fuŝajn rezultojn. Unu el tiuj fakoj estas la etimologio, kie ofte senlima imagpovo de aŭtoroj anstataŭas faksciojn pri lingvoj kaj lingvistika metodologio. Ekzemple, Leander Tell en *La bela subtera mondo* klarigas, ke “stalaktito” kaj “stalagmito” venas de la grekaj vortoj *stalagma* (= guto) kaj *lithos* (= ŝtono) (pĝ. 21). Nu, s-ro Tell estas speleologo, ne etimologo, do li stumblis pri la deveno de la du geologiaj fakterminoj. En la

helena lingvo, *stalaktos* signifas “gutanta” (de la plafono de kaverno). Ekzistas ankaŭ du vortoj, *stalagma* (= guto) kaj *stalagmos* (= gutanta). Al la radikoj *stalagm-* kaj *stalakt-* estas aldonita la helena sufikso *-itēs*, uzata por nomoj de mineraloj. Estas, do, evidente, ke la helena vorto *lithos* (= ŝtono) tute ne formas parton de “stalaktito” kaj “stalagmito”.

Ankaŭ la ezoko alportas bizarajn

Lastatempe mi trovis ankoraŭ unu ekzemplon de fantazia etimologio en la romano *La nokto de la ezoko* (1992) de Serĝo Elgo (pseŭdonimo de la franca esperantisto Georges Lagrange (2)). Jen du citaĵoj.

a. “Kiam mi estis dekdujara knabino kun rigida harplekto ĉe la dorso, kiam mi estis iu ‘Backfisch’, kiel diras la Germanoj, kaj vi reveme bela kaj senaplomba junulo ...” (pĝ. 79).

b. “Unue mi estis nur ridinda ‘Backfisch’, kiel mi jam diris kaj cetere mi sciis, ke vi estas treege enamiĝinta” (pĝ. 147).

Rimarku, ke en la du citaĵoj “Backfisch” aperas kiel neasimilita germana vorto. Kio je la kadavriĝinta kapo de la ezoko estas tiu “Backfisch”? Nu, Elgo/Lagrange komplezeme glosas tiun fremdaĵon jene. BACKFISH: (prononcu: bakfiŝ) germanlingva esprimo, laŭvorte “retrofiŝo”, t. e. fiŝeto, kiun oni reĵetas al la maro, ĉar ĝi estas ankoraŭ tro malgranda. Ŝerca esprimo por nomi tro junajn junulinojn, ankoraŭ ne sufiĉe virinajn” (pĝ. 171). Okazis fiŝa fuŝo en tiu gloso, ĉar la dua silabo de la vorto ŝanĝis sian naciecon kaj aperis en la angla formo: -FISH! Efektive, la gloso demonstras sen nubo da dubo, ke Elgo/Lagrange kompetentas nek pri iĥtiologio (fiŝscienco), nek pri ortografio, nek pri etimologio.

La bakfiŝo de Raymond Schwartz

Tri jardekojn antaŭ la publikigo de la romano de Elgo/Lagrange, alia franco, Raymond Schwartz, kontribuis la vorton "bakfiŝo" al la Esperanta slango. Jen du citaĵoj el lia romano **Kiel akvo de l'rivero** (1963).

a. "Baldaŭ poste la servisto enkondukis ankoraŭ unu patrinon, kun filino ĉi-foje, knabino en la bakfiŝaj jaroj" (pĝ. 141 - 142).

b. "'Tute simple kriegi en lian vizaĝon: Tri berlinaj bakfiŝoj deziregas vidi vin! moketi Lotte" (pĝ. 148)

Piednote de pĝ. 142 la glosa de Schwartz klarigas, ke "bakfiŝo" ne estas fiŝkaptada sed kulinara termino.

"Germ. **Backfisch** = bakfiŝo, sed ni diras, pli ĝuste, fritita fiŝo. La plej ofta senco de **Backfisch** en la germana lingvouzo estas 'plaĉaspekta fraŭlineto, ĝenerale inter 14 kaj 17 jaroj'."

Ho ve! Ĉu okazis krak' en la kap' de Elgo/Lagrange? Kie li fiŝis sian falsan etimologion de "Backfish" [tiele!]? Nur se ĝi estus angla kunmetaĵo - **back** + **fish** - estus eble traduki ĝin per "retrofiŝo". Pruvo, ke ĝi estas germandevena, troviĝas en germanaj vortaroj, kiuj, krom la primara signifo de bakita fiŝo, aldonas ankaŭ la figuran sencan de "junulino", "junfraŭlino", "adoleskantino" k. s. "Bakfiŝo" kiel depruntita vorto troviĝas ankaŭ en la nederlanda, norvega, sveda kaj hungara lingvoj. Estas atestaĵo, ke **Backfisch** kun la metafora senco de nematureco aperis en la germana lingvo jam en 1555.

Notoj:

1. La verbo "dileti" ne estas registrita en **Plena Ilustrita Vortaro kaj Suplemento (PIVS)** sed ĝi estas facile retroformita de

la substantivo "diletant/o" laŭ la analizo "dilet/ant/o".

2. La pseŭdonimo Serĝo Elgo estas formita anagrame surbaze de kelkaj literoj en la franca nomo de la aŭtoro, Georges Lagrange.

g e O R G E S L a G r a n g E + O

Sieĝo de Brno

Ĉijare la urbo Brno rememoras la 350-an datrevenon de sieĝado fare de la sveda armeo en la jaro 1645. Furiozis la Tridekjara milito, kaj al Brno almarŝis svedaj trupoj sub komando de generalo Leonhard Torstenson. Unuafoje en 1643: tiam la armeo restis ĉe Brno nur kelkajn tagojn, ne komencante sieĝadon, ĉar la urĝaj militaj devoj revokis ĝin reen al la nordo de Eŭropo. Nur en 1645, kiam estis konkeronta precipe Vieno (de kiu Brno ne multe distancis!), Brno travivis sieĝadon kun ĉiuj sekvoj. La sieĝado daŭris de la 3-a de majo ĝis la 27-a aŭgusto 1645, kaj por honori la urbon necesas diri, ke kvankam generalo Torstenson disponis pri preskaŭ dudekobla superforto de bone ekzercita kaj armita armeo, la defendantoj de Brno, fakte nur simplaj loĝantoj, brave rezistis ĝis plena venko. Torstenson ne sukcesis Brnon - kiel unu solan el urboj de Moravio - faligi sur genuojn kaj konkeri.

La defendon de Brno tre sukcese organizis juna franca kolonelo Raduit de Souches, kune kun la komandanto de la kastelo Špilberk George J. O'Gilvy, kun rektoro de la jezuita kolegio de Brno patro Martin Sředa (Stredovius) kaj kun la landa hetmano Zikmund Ferdinand Sak de Bohuňovice. Kvankam ankaŭ Brno suferis multajn materiajn damaĝojn, ĉirkaŭ 250 loĝantoj falis kaj pluaj dekoj

estis vunditaj, la atakon ĝi eltenis kaj ne rezignis. La batalo pri Brno estis el vidpunkto de la Tridekjara milito nur malgranda epizodo, sed por la historio de la urbo mem, kiu pro sia heroo defendo estis honorita de la imperiestro per titolo de landa ĉefurbo kaj per pluaj ekonomiaj kaj politikaj honorigoj, havis kaj havas ĝis nun grandan signifon: ĝi pruvis, ke kiam la civitanoj scias unuigi en oferemo por sia urbo, ili kapablas rezisti ne nur al milita superforto, sed kapablas solvi ankaŭ aliajn gravajn problemojn de la urbo, kiuj poste alportas utilon eĉ al ili mem. Kaj tio estas, miaopinie, tre instrua heredo el la historio de tiuj militaj jaroj.

*Dr. Milena Flodrová,
historiistino de Brno*

Vladimír Menšík

Inula vino

Luboš Kostelka, multe pli ol ni ĉiuj, krom tio, ke li studis kun ni Janáček-Akademion de Muzaj Artoj en Brno, zorgis ankaŭ pri tio, kio okazas ĉirkaŭe, kia estas la vivo kaj prosperado. Tial li sciis, ke en Slovakio mankas pura alkoholo, sed kompanse ili havas Montgomery-mantelojn (estis post la milito), sekve li venis al mi (mi loĝis en fabriko, kiu estis kemia kaj havis damifonojn) kaj diris: „Elpruntu du tri damifonojn, knaboj de farmacio donacos al mi puran alkoholon, kaj mi vestos vin.“ Simple, ke mi ricevus manteleton. Tial mi alportis al Luboš la petitajn damifonojn, kaj li diras: „Ĵaŭde mi altrajnos direkte de Púchov, atendu, kaj Montgomery-mantelo estas via.“ Mi atendis kaj vere, la unua, kiun mi vidis (la pordo rapide malfermiĝis), elrigardis Kostelka. Mi diras: „Diable, preciza li estas,“ sed li elsaltis el la trajno, kaj

kvazaŭ min ne konante, preterkuris min. Mi diras: „Lubošĉjo, ĉi tie, - nu! - la Montgomery-mantelon!“ Li respondas: „Sprintu for, mi petas, persekutas min polico!“ Sekve mi ne havis damifonojn, li ne havis alkoholon, kaj la Montgomery-manteloj ... pri tiuj ni povis nur sonĝi!

Kaj ĉi tiu Luboš Kostelka estis enorme inventema agemulo, ĉiam, kiam al li ŝajnis, ke ekzemple inter la domoj restis ne ekspluatita spaco, li konstruigis tie tenisejon. Origine li planis naĝejon, sed ni malmulte fosis, la akvo estus nur tiel ioma, prefere oni tie ludis tenison.

Foje venis Kostelka al mi kaj diris: „Vlado, ĉu mi povas demandi vian paĉjon, ke ni irus al via somerdometo apud la digolago de Kníničky, kunprenus grupon de bravaj amikoj, mi havas kvindek litrojn de inula vino.“ Tiutempe en la centra presorgano de Brno, ĵurnalo Rovnost, aperadis specialaj rubrikoj (ĉar ankoraŭ ne ekzistis kaptostacioj, alivorte „ĉambretoj por ebruloj“, kiel diras la slovakoj), simple tiun, kiu faris ian eksceson, oni kaptis, foton de lia legitimilo kopiis kaj aperigis sciigon en la ĵurnalo: sinjoro tiu kaj tiu, ekzemple Adolf Jebavý, viandisto kaj kolbasisto, nokte detruis tri randoŝtonojn de trotuaro, ĉion kun plena nomo kaj sen pardono, do por ke nin ne trafu similaĵo, ĉe la lago ĉio perdiĝos. Mi demandis paĉjon kaj tiu diris: „Ĉefe, knaboj, ne bruligu la domon, bone?“ Tial amikaro el la teatro iris al la somerdomo kaj vere portis gigantan damifonon, kvindek litrojn da vino. Ĝi pezis - kaj tia kvantego, hm, kie tiu Kostelka tion ... vinkelon ili ne havis kaj ĉi tio ne estis lia artiklo, li laboris, kiel mi menciis, pri alkoholo kaj tekstilaĵoj?

„Lubošĉjo, kia vino ĝi estas?“ kaj li

rediris: „Inula vino.“ Kaj kelkaj diris: „Aha, inula vino, nu jes.“ Kaj al tiuj, kiuj demandis, kia inula, li ne respondis, sekve ni atingis vespere la celon puraj, ne makulitaj de scioj, bruligis tendarfajron, en la dometo kolektis glasojn de mustardo, kaj nun oni verŝis. Kaj la vino estis venteta, kiel oni diras en Moravio, venteta, sed gajiga, la homoj tuj komencis kanti eĉ iu muzikis, ne havante gitaron. Laŭ gusto la vino estis interesa, nur parte ĝi gustis kiel vino, sed ankaŭ kiel griota likvoro kaj vermo, tial: „Kia estas, Luboš, la vino?“ li diris: „Inula.“ „Inula?“ kaj kiam iu demandis jam la trian fojon, la ceteraj admonis: „Lasu nin trankvilaj, se ĝi ne plaĉas al vi, ne trinku, sed ni frandas ĝin ... tra la la.“

Grandioza amuzo, fajro sputis fajrerojn, ĝis la momento, kiam el la arbaro, kien li antaŭe forrapidis, elkuris asistanto de dekoraciisto de la Ŝtata Teatro en Brno, certa Kraus, kaj elbuŝigis: „Kian fiaĵon ni trinkas?“ Ĉiuj diris: „Pri tio ni jam foje parolis, se ĝi ne plaĉas al vi, ekspedu vin for!“ - Sed li diris: „Atenton, sinjoroj, mi estis en la arbaro, kaj al mi lumas la merdo! Venu rigardi!“

Ĉiuj supoze, ke temas pri ŝerco, iris, sed terurigis! Tie sur malgranda herbejeto kuŝis io, kvazaŭ forfalinta tubo de neono. Kvazaŭ fosfora hormontrilo de preĝeja horloĝo aŭ la universala kongreso de lampiroj, koncize - io mistera.

Ni gapis kaj miris: „Kiel tio eblas?“ kaj Kraus provokis: „Nu, diru al Kostelka, ke li klarigu, kion ni trinkas! Kiu iam aŭdis pri ia inula vino?“ Kaj ĉiu parolis: „Tio estas vero, ni petas vin, kio ĝi...“ kaj subite ni ektimis, ĉar tiutempe okazadis procesoj kontraŭ fervojistoj, kiuj vidis sur cisterno, staranta en la stacio, kranion kun

skeletaj ostoj, ridis en la animo, min vi ne superruzos, ĉerpis kaj blindiĝis. Kaj poste mortis. Tial ni ektimis, ke ni trinkas lignan alkoholon aŭ kion, ĉar ni ne povis scii, ĉu ni vidas aŭ ne vidas, ĉar regis mallumo kiel en katakombo.

Iu diris: „Kostelka, kia estas la vino? Kaj ne ŝercu pri tio, vi ja vidas, ke la situacio estas grava.“ Kaj Luboš Kostelka diras: „Mi ĵuras al Dio, ke la baza materialo efektive estas vino, sed rigardu. Mia onklo ... al li ĝi acidiĝis, kaj ĉar li estas tia, nu, li elĵetus ĝin, kaj ĉar mi havas nenianj vinkelojn nek tian kvanton da vino, mi diris al li, oĉjo, ne elĵetu ĝin, ĝi iomete acidiĝis, sed ne gravas, ĉe iu okazo eblos... Kaj li donacis ĝin al mi. Kaj nia mastrumantino, kiu konas receptojn, konsilis:

Sinjoro Kostelka, en acidiĝintan vinon estas plej konvene meti kuracajn herbojn, tiuj eltiros la acidecon kaj ne forprenos de la vino ĝian guston. Ili aldonas nenian propran nuancon. Poste vi kribros ĉion kaj ricevos la vinon tia, kia ĝi estis antaŭ acidiĝo.“ Kaj Kostelka daŭrigas: „Sed mi sukcesis havigi al mi nenion alian ol la inulan arbedon.“ (Tio estas kontraŭ reŭmato.)

Li perforte enigis ĉion en la damijonon, kaj la vino densiĝis, gelateniĝis, tial li kuris al farmaciistoj, tiuj donacis al li puran alkoholon, kaj li maldensigis la likvaĵon. Ŝajnis al li, ke ĝi estas tro maldensa, do li trempis la arbedon kaj estiĝis tia galimatio. Li diris: „Sed, knaboj, ĝi estas absolute sekura, pri ligna alkoholo ĝi neniam aŭdis.“

Sed ni ne plu kredis lin, ĉar la pruvo de la vero estis terura. La lumo kreskis. Kaj iu diris: „Sinjoroj, necesas doktoro!“

Mi diris: „Proksime loĝas tia, sed ne ĝuste afablulo, tiu nin ĉiam sendas ... ien.“ Tamen mi iris tien, ĉar mi timis ankaŭ pri mi mem, mi iris kaj frapis la pordon. Tie aŭdiĝis voĉo: „Kio denove?“

Mi diris: „Sinjoro doktoro, la unua helpo.“ Li respondis: „Ekspedu vin ien!“ Kaj mi ripetis: „Ne, efektive, la unua helpo.“ Sinjorino doktoredzino sufloris, ke li sendu min inferen, sed mi ne aŭdis, ĉar nia sano estis endanĝerigita. Mi diris al mi, ke mi devas ion gluti, elteni, kaj mi daŭrigis la frapadon, ĝis la doktoro elkliniĝis kaj kriis: „Homo, kion vi faras, mi vokos kontraŭ vi policon!“ Kaj mi diris: „Temas pri la unua helpo. Ni trinkas vinon, pri kiu la posedanto asertas, ke ĝi estas inula, sed ni timas, ke ni trinkas lignan alkoholon, ĉar al kamarado lumas en la arbaro lia ekskremento.“ Li diris: „Kion vi diras? Drinkaĵo, junulo, povas lumigi nur okulojn.“

Sed li ne plu restis trankvila, kiam li aŭdis pri ligna alkoholo, ĉar efektive tiaj kazoj tiam abundis, li vestiĝis, lamentis, sed iris. Kion la misteraĵo faris kun li, kiam li venis al la herbejeto, vi ne povas imagi. Li stariĝis, ekrigardis miajn kamaradojn, ili staris kiel funebruloj, ĉar jam projekciĝis antaŭ ili la filmo, ke ili adiaŭas la familion „mi blindas kaj ne vidas“, li denove rigardis tion kaj deklaris: „Sinjoroj, la merdo efektive lumas.“ Ili diris: „Sinjoro doktoro, kaj ne ĉesas. Ni ĉi tie rigardas ĝin jam duonhoron kaj ĝi estas ĉiam pli kaj pli perfekta.“ Li proksimiĝis al tio kaj diris: „Al kiu ĝi apartenas?“

Tiu Kraus, subite enorme modesta, diris: „Tio ne valoras parolon.“ La doktoro diris: „Venu, junulo. Ĉu eble vi ĉi tie

stumblis je io?“ - „Nu, preskaŭ mi falis.“ Kaj la doktoro: „Je tiu ĉi arbostumpo, ĉu?“

Tie estis putrinta arbostumpo, kiu de si mem fosforeskis, precipe kiam ĝin injektis de malsupre tia varmeĝo.

Ni estis feliĉaj, ke ni ne blindiĝos. La doktoro diras: „Vi devas proponi al mi por gustumi,“ kaj li gustumis ... kaj pravis. La sekvan tagon efektive lumis nur niaj okuloj.

Notoj:

inulo (*latine: Inula*) planto kultivata ĝardene por ornamaj aŭ kuracaj celoj (*ĉeĥe: oman, popole: vománek*)
damljono botelego por vino (Granda Vortaro Franca-Esperanta, 1992)



Vladimír Menšík (1929-1988) ĉeĥa komedia aktoro, eminenta rakontisto, unu el plej ŝatataj kaj amataj artistoj de la ĉeĥa nacio.

Luboš Kostelka, ankaŭ aktoro, aperanta ofte en televido, kvankam ne tiom populara kiel V. Menšík

PRI ŜAKHORLOĜO

Ĝis la mezo de la 60-aj jaroj de la 19-a jarcento oni ludis ŝakkonkursojn sen tempolimigado. Partio povis daŭri 20 aŭ eĉ pli multajn horojn, la rivaloj primeditis unuopajn movojn ne sporade 2 horojn. Kelkaj kviete dormetis atendante la movon de la kontraŭulo, aliaj ekscitiĝis kaj demonstre turniĝis al la publiko kun peto, ke ili veku lin kiam la opoziciulo finfine movos figureton.

La plej forta angla ŝakisto en la mezo de la pasinta jarcento Howard Staunton kuraĝis ankoraŭ pli kaj en la gazetaro publikigis, ke li dezirus ĵure akuzi tiujn el siaj rivaloj, kiuj ne kapablas lin venki kaj prefere klopodas la partion "trasidi"! Okazis eĉ komikaj situacioj. En la unua internacia turniro en Londono 1851 la ludantoj nur movis la figuretojn, dum la protokolon pri la daŭro de partio prizorgis la sekretario. En la protokolo pri matĉo Williams - Mucklow aperis jena enskribo: "La partio restis ne finita, ĉar ambaŭ ludantoj ekdormis." La banala proverbo, ke tempo estas mono, fine venkis ankaŭ en ŝako. La tempo por meditado estis energie limigita, kaj iom-post-iome estis akceptita normo; ke en la internaciaj turniroj rezerviĝas 2,5 horoj por 40 movoj de ĉiu ludanto. Por mezurado komence servis sablorhorloĝoj - la mekanikaj aperis unuafoje en Parizo 1867. Temis pri simpla vekhorloĝo kaj la konsumita tempo estis por ĉiu ludanto "registrita" aparte.

Speciala ŝakhorloĝo estis unuafoje uzita en Londono 1883. Ĝi konsistis el du horloĝoj kunigitaj per granda ŝaltilo, kiun unu el ili haltigis. Plie ĝi enhavis specialan nombrilon de movoj kaj sonorilon, kiun ĉiam eksonoris post certa kvanto da movoj. La projektisto de tiu horloĝo estis anglo Thomas Bright Wilson, sekretario

de la ŝaka klubo en Manchester.

La spirita patro de la nuntempa ŝakhorloĝo estis angla grandmajstro Joseph Henry Blackburne. Dek unu jarojn poste konstruis en Lepsiko Gustav Herzog la unuan ŝakhorloĝon, kiu ne moviĝis, sed estis firme kunigita per premado de butonoj kiel nuntempaj horloĝoj. La flage-ton sur la horloĝo rekomendis en 1899 sekretario de la nederlanda ŝaka asocio H. D. Meljer. Kvankam la tiam kutima ekzamenado per akraĵo de razilo aŭ tranĉilo, ĉu la montrilo jam efektive atingis la dekduon, kaŭzis multajn konfliktojn, daŭris multajn jarojn, antaŭ ol la kontrol-flage-to estis ĝenerale akceptita en la tuta mondo.

Nun disponeblas perfektaj elektronikaj horloĝoj kaj la lastmoda modelo estas horloĝo "Chronos", inventita de usonano Fischer kaj unuafoje oficiale uzita ĉe lia matĉo kun Spasskij en 1992. Per kio diferencas la Fischera horloĝo de la klasika? En grava turnira partio ambaŭ ludantoj havas komence je dispono po unu horo. Se ili meditas, ilia tempo kompreneble kuras, sed post realigo de movo ili kutime ricevas plian minuton (depende de tio, kiu el la 8 gradoj de la horloĝo estas elektita - ludeblaj estas ankaŭ fulmaj partioj kaj rapida ŝako). Praktike tio signifas, ke foriĝas la kulminaj tempaj streĉoj, la fonto de gravaj eraroj. Chronos ne havas montrilon kaj kontrolan flage-ton. En alumina kesto estas instalita cola displejo kaj ruĝa lumo atentigas ludanton, ke nun estas lia vico. Tamen uzadon en ŝak-klubejoj ankoraŭ malhelpas konsiderinde alta prezo - 120 usonaj dolaroj.

Jan Kalendovskij

Jaroslav Mařík

Andreo Cseh

(1895-1995)

En nia Esperanto-Movado kreskas la nombro de centjaraj kaj pli ol centjaraj jubileoj kaj memor-datoj, post kiam la Movado mem atingis plenan jarcenton jam antaŭ ok jaroj, ne menciante la datojn el eksterlando. Nur en Starto 5/6-1994 ni vidas naŭ datonombrojn de 100 aŭ pli da jaroj en la ĉeĥa Movado. Nunjare atendas nin rememori la 100-jaran jubileon ankaŭ de fama persono de la internacia Movado, Andreo Cseh.

Jakub (Jakobo) Čech (ĉeĥ), avo de Andreo Cseh, el la ĉeĥa urbo Bohdaneč, fine de sia labor-restado en Vieno estis sendita, post la revolucia jaro 1848, en Transilvanion, tiam orientan parton de la Aŭstri-Hungara imperio, ĉar tie la hungaraj oficistoj estis strikantaj. - Tie naskiĝis la 12an de septembro 1895, en Marosludas, la nuna rumana Ludoŝul de Mureș, al Otto Felix, filo de Jakobo Čech, kaj hungara edzino Gabriella Komáromy de Belenyeș, filo Andreo. (La „y” en ŝia nomo atentigas pri nobela-kvankam malalta deveno, simile kiel ĉe Baghy, Kalocsay, Ferenczy). La hungara pastro laŭkutime madjarigis la nomon de la knabeto de Čeĥ al Cseh (cs = ĉ). Sub tiu nomo la juna Adreo famiĝis en Esperantio.

Andreo, malgraŭ ke li estis edukita de la patrino en la madjara lingvo kaj studinta la universitaton en Budapeŝto, sopiris scii veron pri siaj ĉeĥaj antaŭuloj, kaj tial li dum sia restado en Pardubice, 1925, petis d-ron Fousek en Přelouč provi trovi liajn ĉeĥajn parencojn. En la afero helpis ankaŭ s-ino Grossmannová-Vamberová. En 1980-81, laŭ instigo de

Ed Borsboom, amiko kaj biografiisto de Cseh (la biografio estas aperonta nunjare) plu serĉi mi utiligis la afablecon de s-ino Jarmila Rybáčková (Rýznarová) en Pardubice. Tiu eĉ sondis en la ŝtata arĥivejo en Zámrsk kaj plu en Bohdaneč kaj Probluz. Ni nun konas la nomojn de vico da Cseh-parencoj kun la nomo Ĉeĥ. Ekz. unu el la nevoj de la avo Jakobo estis prof. Leander Čech, mezlerneja direktoro en Telč, konata kritikanto en la ĉeĥa literaturo.

La vigla junulo Andreo fariĝis esperantisto en 1911 kaj pastro en 1929, tamen liberigita de la episkopo pri pastraj devoj por sin dediĉi al poresperanta laboro. En 1920 li ellaboris en Sibiu (Rumanio) novan metodon de kursgvidado, kunfondis Rumanan E-Centron kaj sekretariis en Internacia Centra Komitato. Li inventis la t.n. rektan metodon por instruado de esperanto, la li nomitan CSEĤ- aŭ ĈE-METODO. Ĉe tiu metodo la kursestro ne konas la nacian lingvon de la kursanoj. Tio iom memorigas la metodon de J.A.Komenio „schola ludus” - lernejo per ludo, aŭ instruado kvazaŭ ludo.

Andreon Cseh ni konas kiel la plej grandan pedagogon en la E-Movado. Laŭ indikoj de Ed Borsboom por la dua eldono de la Enciklopedio de E., Cseh per siaj Ĉe-kursoj akiris subtenon de multaj aŭtoritatuloj kaj havigis al la Movado ĉ. 140 000 novajn adeptojn. Liaj kursoj preskaŭ sensacie elstaris pro la partoprenanto-nombro pli granda ĉe la kursfino ol ĉe la komenco. La gazetaro parolis pri „renasanco de E-o”. - Bedaŭrinde, kiom da freŝbakitaj esperantistoj restis el tiuj miloj? Evidente, la Ĉe-metodo scias rapide allogi, sed ankaŭ forgesigi sen necesa plua ioma

studo „normala“. / -- Tomáš Pumpr en sia „Balado pri Ĉe-instruisto“ gaje prisatiras fervoran Ĉe-instruiston Sigismundon Praganon (Ligilo, Prostějov, 6 - 8, p. 36).

Cseh gvidis ankaŭ internaciajn seminariojn pedagogiajn, 1929 - 1939, en kelkaj landoj (Budapest, Arnhem, Krakovo). Loĝante en Nederlando, de 1929, li fondis en majo 1930 kun ges-oj Isbrücker Internacian Cseh-Instituton (de 1952: Internacia Esperanto-Instituto), kun la celo eduki Cseh-metodajn instruistojn. La instituto poste fariĝis pli kaj pli fokuso de E-a kulturo. Ĝi liveris al la movado ĉ. 600 diplomitajn Cseh-instruistojn, kiuj laboris en 28 landoj (ekz. niaj K. Šolc en Belgio kaj D. Bartošik, en Jugoslavio kaj Nederlando, kie li edziĝis al nederlandino). Pro granda sukceso de la unua internacia seminario la urba estraro en Arnhem disponigis vilaon kun parko por kursoj kaj konferencoj de la Instituto. La „Esperanto-domo“ posedis ĉiujn apartenaĵojn; tie okazis regule kursoj kaj seminarioj por E-instruistoj.

En la jaroj 1932 - 1964 Cseh fondis kaj redaktis la monatan gazeton „La Praktiko“, de 1942 organon de Universala Ligo cele de edukado de la homa socio.

Tre efika iĝis la uzado de propra tutmonda monsystemo de la simple sentebla enletero. Uzata ankoraŭ en la 70-aj jaroj. La Instituto larĝskale propagandis la internacian lingvon en fakaj medioj (ekz. mondfederalistoj), eldonis librojn, aranĝis denove seminariojn por instruistoj.

Pro sia poresperanta valoro A. Cseh estis longtempe membro de la Akademio de E-o kaj ankaŭ ĝia vicprezidanto.

La meritoj de Andreo Cseh kuŝas - laŭ difino de Ed Borsboom - en:

1) instrumentado, 2) didaktika laboro, 3) grandskala akirado de novaj esperantis-toj, 4) favorigado de aŭtoritatuloj, 5) eldonado de „La Praktiko“, 6) eminenta oratoreco (simila al Privat kaj Lapenna). Li ankaŭ donis sistemon pri la elparolo de Esperanto; 7) verkado de bona prozo.

(Vidu ankaŭ „La deveno de A. Cseh“, Starto 1/1981, p. 15-16, de la sama aŭtoro.)



Tomáš Pumpr Balado pri Ĉe-instruisto

(Pamfleto kun tragika fino.)

Kaptas min ĉe klink' de knara gurdo
por amuzi plebon de bulvard',
kaj mi kantas pri terura murdo,
mi, popola, foir-festa bard':

Vivis foje hom' en urbo Prago,
Sigismundo estis lia nom';
li dediĉis sin en unu tago
al la Esperanto-idiom'.

Iam aŭdis li Ajayion Kolan,
viron kun la nigre nigra haŭt'.
La prelegon Esperant-parolan
li plezure kvitis per aplaŭd'.

Sed li ploris laŭte kun lamento,
ke la sankta Esperanto-kult'
en Afrika nigra kontinento
tiom longe restas sen rezult'.

Ne sufiĉas unu Ajayi Kola
parolanta en la Esperant',
se li restas preskaŭ unusola
en la tuta vaste vasta land'.

*Kaj li diris: „Verdan propagandon
oni devas fari laŭ sistem':
travojaĝi la Afrikan landon
tra kaj trae! Kaj mi iros mem!“*

*Li pilgrimi devis sur kamelo
trans dezerta sablo de Sahar',
ĝis li fine venis al la celo
en la indiĝena praarbar'.*

*Ho ve, kial la Fortun' fatala
antaŭ morto ne avizis lin?
Ĉar sovaĝa gento kanibala
en la praarbar' surprizis lin.*

*Ili kaptis lin kaj en vilaĝon
trenis lin sur malfeliĉa voj'
kaj tie lin metis en la kaĝon...
Estis vane plori: „Ho ve, oj!“*

*Ili volis laŭ kutim' Afrika,
laŭ konata kanibala mor'
lin grasigi kaj lin nutri dika,
poste buĉi lin kaj manĝi for.*

*Tamen ili tion ne atendis,
ke ne manĝos la esperantist':
vane ili ja frandaĵojn sendis,
li surprizis ilin per rezist'.*

*Tio estis tre, tre malagrabra,
ĉar pro larmoj kaj melankoli'
li maldika iĝis, iĝis magra,
ĉiun sian grason perdis li.*

*„Kial, viro, vi ne ĉesas larmi?“
lin demandis la ĉef-kanibal'. -
„Ĉar ne povis realiĝi al mi
mia Esperanto-ideal'.*

*Mi ne timis trans la maron vadi,
por alveni fine al la cel':
Esperanton al vi instruadi
kaj vin varbi por la Verda Stel...“*

*„Do atendu iom en la kaĝo“
- petis lin la kanibala ĉef' -
„Ke ne estu vana la vojaĝo,
realiĝos via vivo-rev.“*

*Kaj nun ĉio sin komencis ŝanĝi,
ĉesis larmoj, ĉesis „ve ho ve!“
Kaj li rajtis kurson ekaranĝi
laŭ metodo de Andreo Ĉe.*

*Elegante, forte kun kuraĝo
lernis tuta kanibala gent'.
Instruisto sidis en la kaĝo
kaj instruis kun temperament'.*

*Lia klaso montris sin talenta,
kaj li post la deka lecion'
estis dika, estis korpulenta
kaj rondforma kiel la melon'.*

*„Mi deziras bonan apetiton...“
estis lia adiaŭa fraz' -
Kaj ili komencis sian riton
preparante spicon por kolbas'.*

*Tia estis fina leciono,
tia estis lia vivofin'...
Ili lin kuiris en kaldrono
kaj distranĉis kaj formanĝis lin.*

*Nur la koron ili semis plante
laŭ la pet' de lia testament',
„kaj ĉirkaŭ ili kantis Esperante:
„En la mondon venis nova sent'.“*

*„Ligilo“, 6-8, 1939
Prostějov*

Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature (4)

Josef Kavka

-ED- kaj -ET-

Kvaravice (v. STARĤO 4-1994, p. 20-21, 5/6-1994, p. 23-26, kaj 1-1995, p.) ni dediĉu atenton al okazoj, kie fontlingva radikfina -ET- estas modifita per -ED-, por eviti koincidon kun la sufiksa -ET-.

Da fundamentaĵoj tiaspecaj ni trovis sole 5. (Enkrampe ni listigas po 2 etnolingvaj ekvivalentoj):

- bufedo (*fr: buffet, it: buff etto*)
- bukedo (*fr: bouquet, ro: buchet*)
- cigaredo (*fr: cigarette, de: Zigarette*)
- pikedo (*fr: piquet, it: picch etto*)
- planedo (*fr: plan ete, la: planeta*)

Nia Majstro evidente timis la homonimecon de bufet-o kun buf-eto, de buket-o kun buk-eto, de cigaret-o kun cigar-eto, de piket-o kun pik-eto kaj planet-o kun plan-eto. Sen analizi, ĉu lia timo estis prava, ni tuŝu almenaŭ unu problemon, kiu estiĝas pro lia -ED-: Nek Fundamento, nek PIV konsilas al ni, kiel esperantigi terminojn parencajn al „planedo“. Ĉu teni konsekvence la misforman -ED- ekz. por „planedoido“ (*de: Planetoid, en: planetoid, fr: plan etoide, it: planetino, ru: planetoid*)? Ĉu same procedi okaze de „planedario“ (*de: Planetarium, en: planetarium, fr: plan etarium, it: planetario, ru: planetari*)? Aŭ rezigni pri la misformado kaj imiti la etnolingvajjn, absolute internaciajn formojn kun -ET-?

Inter oficialaĵoj kun -ED- apenaŭ iu nin interesus. Eble kaskedo, kiun oni deziris distingi disde la fundamenta kasketo. Nu, ĉar ne temas pri naturhistoria

nomenklaturaĵo, ni lasu la problemon al specialistoj pri kapvestado ...

Da neoficialaj PIVaĵoj estas 10:

1. arbedo certe devus ne konfuziĝi kun arb-eto. Tamen, el vidpunkto nomenklatura (ne komunuzata), la botanikistoj eble preferus la terminon frutiko (*la: frutex*); kp. la PIVan, kvankam dubindan ekvacion: fruteska = arbusteca. El frutiko oni facile derivus la terminojn: duonfrutiko (*la: suffrutex*, ekz. peonio arbeka), fratiketo (ekz. eriko), frutikeca k.t.p.
 2. bankedo (*en + fr: banquet*). Ĉu banket-o povus kuntekste kolizii kun bank-eto? Eble en jena ŝerca frazo: „En la banko oni okazigis banketon?“
 3. barbedo (*fr: barbette*), 4. bonedo (*fr: bonette*) kaj 5. etikedo (*fr:  tiquette*). Sen komentoj ...
 6. kasedo (PIVS, sed ankaŭ Pekoteko 87/182). Ĉi-okaze regas kaj eble regos malunuco por difini kasedon, kaseton, kazeton ...
 7. komedo (*fr: cornette*). Sen komento.
